EL POPOLA ĈINIO
8
1976
中国报道






Gardo *(guaŝo)*

# Ekspozicio de Grandaj Argilaj Skulptaĵoj «Indigno de Servutuloj»

La servutuloj brave leviĝas al batalo por entombigi la damnindan feŭdan servutan sistemon.






Parto de la ekspozicio «Indigno de Servutuloj»

"Redonu mian infanon!" kriegas la patrino. Ŝia infano estas vive enterigota de brutala lamao sub la fundamento de templo.







Tibeto estas bela kaj riĉa loko en la sudokcidento de nia lando. Tie vivas 1,600,000 diligentaj kaj kuraĝaj tibetanoj kaj alinaciecaj popolanoj.

La malnova Tibeto estis feŭda servuta socio kun politiko kaj religio en unueco kaj sub la diktaturo de lamaoj kaj nobeloj. La tri mastroj (loka registaro, templo kaj nobelaro) kun Dalaj-lamao kiel la ĉefo okupis la tutan agraron kaj plejparton de la brutoj, dum la servutuloj kaj sklavoj, kiuj konsistigis 95 pocentojn de la tuta loĝantaro, havis nenian produktan rimedon, nenian rajton kaj liberecon, kaj estis kruele turmentataj de nekalkuleblaj servutoj kaj impostegoj. Kaj krome, por defendi sian kriman regadon, la reakcia loka registaro praktikis plej barbarajn subpremon kaj masakron al la servutuloj.

ĝardante sian plorantan bebon, la servutulino laboreganta
la mastro ne povas iri mamnutri ĝin.



La servutulo, kiu oponas kontraŭ la reakcia regado de la servutul-mastro, estas ligita sur bovo kaj liaj dek fingroj estas enpikitaj de bambuaj pingloj.



Kie estas subpremo, tie okazas opono. La miliono da servutuloj neniam estis subigitaj de glavoj kaj kruela torturado de la servutul-mastroj. Por emancipiĝo ili faris plurfojajn grand-skalajn batalojn malcedemajn, kiuj peze batis la reakciajn fortojn de la servutul-mastroj.

En la longa historio, la ekstreme reakcia diktaturo de la servutul-mastroj dronigis longe Tibeton en malriĉecon kaj postiĝintecon. La paca liberigo de Tibeto en 1951 malfermis novan paĝon de ĝia historio. Sed en 1959 la naciperfida kliko estrata de Dalaj-lamao faris kontraŭre-volucian arman ribelon. Petate kaj helpate de la miliono da servutuloj la Ĉina Popola Liberiga Armeo subpremis la ribelon, disvolvis demokratian reformon kaj ruinigis la reakcian regadon de la tri mastroj kaj abolis la plej reakcian, plej malluman, plej kruelan kaj plej barbaran feŭdan



La servutulo oponas kontraŭ la turmentado de reakciaj lamaoj, kaj la "viva budho" ordonas dehaki al li la mem-brojn. Antaŭ la ekzekutisto li montras nenian fleksiĝemon.





Plenumante servu-tadon la maljuna servutulo falis teren sputante sangon pro la terure laciga la-borado. Tamen la intendanto ankoraŭ skurĝis lin. La mez-aĝa servutulo in-digne ŝirmas la fa-linton de la skurĝa-do.



La indignaj servutuloj sturmas malamikojn.

servutan sistemon. La miliono da servutuloj stariĝis kaj fariĝis la mastro de la nova Tibeto. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, la tibetanoj fluge transpaŝis kelkajn jarcentojn kaj rapide marŝas sur la socialisma vojo.

«Indigno de Servutuloj» konvinke malkaŝas kaj akuzas la krimon de la feŭda servuta sistemo de la malnova Tibeto, entuziasme prikantas la batalan spiriton de la servutuloj kaj enkorpigas la brilan penson ke "la sklavoj kreis la historion". La ekspozicio konsistas el 4 partoj kun 106 argilaj homstatuoj kun grandeco de vera homo, 6 bestaj statuoj kaj 4 reliefoj. La skulptajoj estas tre versimilaj kaj havas drastan artan infektivon.



La heroa servutulino indigne akuzas malamikojn.

EL POPOLA ĈINIO
中国报道

N-ro 8
(217)
1976

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

*KOVRILO:*

Paĝo 1: Intelektaj gejunuloj lernantaj en vespera politika lernejo

Paĝo 2: Gardado (guaŝo)

Paĝo 3: Argilaj skulptaĵoj

Paĝo 4: Ĵonghu-lago de Gujlin

BILDPAĜOJ:

1. Ekspozicio de Grandaj Argilaj Skulptaĵoj "Indigno de Servutuloj"
2. Ili estis ruĝgvardianinoj siatempe
3. Freskoj de Han- kaj Tang-dinastioj trovitaj en la kultura revolucio
4. Simfonio "Sagaca Kapto de la Tigra Monto"
5. Aerolita pluvo



# Enhavo

Laboro pri intelektaj gejunuloj al kamparo . . . . 2

Notoj pri loĝpunktoj de intelektaj gejunuloj . . . . 9

Nova paŝtistino sur altebenaĵo . . . . . . . . . 15

Lerni en praktiko . . . . . . . . . . . . . 16

Lernado de Daĝaj akcelas disvolviĝon de la ĉina agrikulturo . . . . . . . . . . . . . . 19

Abunda rikolto de malgrandaj dancoj . . . . . . 27

Aerolita pluvo malofta en la mondo . . . . . . . 31

AMIKECO: Toraka operacio en akupunktura anestezo 33

ĈINAJ NACIECOJ: La uzbekoj . . . . . . . . 34

HISTORIAJ OBJEKTOJ: Freskoj de la dinastioj Han kaj Tang trovitaj en la lastaj jaroj . . . . . . . 35

TRA ĈINIO: La dua granda dolĉakva lago de Ĉinio 38

INTER NI: Kial Ĉinio impostas siajn socialismajn entreprenojn? . . . . . . . . . . . . . . 43

KURANTAJ AFEROJ . . . . . . . . . . . . . 44

# Laboro pri intelektaj

LA movado sendi milionojn da urbaj intelektaj gejunuloj al la kamparo estas grava konsistiga parto de la socia revolucio nun iranta en Ĉinio.

En la jaro 1968, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon: **"Intelektaj gejunuloj iru al la kamparo."** Tuj poste la intelektaj gejunuloj de la tuta lando entuziasme iris al la kamparo kaj rapide formiĝis potenca revolucia fluo, kiu furioze forlavas la malnovajn tradiciajn konceptojn propaganditajn de la ekspluataj klasoj kiel "lerni por fariĝi mandareno" kaj malestimi fiziklaboron kaj kamparanojn. Tiu movado faris signifoplenan kontribuon por limigi la burĝajn rajtojn kaj redukti la diferencojn inter la urbo kaj la kamparo, inter la laboristo kaj la kamparano kaj inter la fiziklaboro kaj la cerbolaboro.

*La sekretario de la urba komitato de KPĈ de Ĝuĝoŭ ĝoje interparolas kun intelektaj gejunuloj de la forstumejo de Honghian-komunumo.*



# gejunuloj al kamparo

De la lastaj jaroj la urbo Ĝuĝoŭ de Hunan-provinco aktive subtenas milojn kaj milojn da intelektaj gejunuloj en fiksa loĝado en la kamparo, por ke ili ricevu reedukadon ĉe la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj sin hardu en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Por atingi tiun celon, Ĝuĝoŭ trovis taŭgan metodon, nome "starigi konstantan rilaton inter urbaj fabrikoj kaj kamparaj komunumoj kaj teni la gejunulojn en kolektiva vivo", per kio ĝi sukcese solvis multajn problemojn aperintajn en la laboro kaj levis la aktivecon de ambaŭ flankoj de la urbo kaj la kamparo por kune kulturi la novan generacion de gejunuloj venintaj al la kamparo. Oni nomas la metodon ponto interliganta la laboristojn kaj la kamparanojn. Dank' al tio aperis bonega situacio por rapidigi la konstruadon de socialisma nova kamparo.

*Scienca eksperimentado pri rapidigo de kreskado de taksusoj*



En la lastaj jaroj Ĝuĝoŭ jam sendis pli ol 12,000 intelektajn gejunulojn al pli ol 400 kultivejoj, forstokulturejoj kaj teplantejoj de kamparaj komunumoj kaj produktaj brigadoj. Sub gvido de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la intelektaj gejunuloj vivas, laboras kaj lernas kolektive. Nun ili fariĝis novaj kamparanoj kun socialisma konscio kaj klereco, laborantaj kiel freŝa forto en konstruado de socialisma nova kamparo kaj disvolvado de la agrikultura produktado.

La supre menciita metodo signifas, ke la urbaj fabrikoj, lernejoj, magazenoj kaj institucioj en kiuj laboras la gepatroj de la mezlernejaj diplomitoj starigas konstantan rilaton kun komunumoj por sendi la gejunulojn tien. Granda fabriko povas teni tian rilaton kun kelkaj komunumoj; kaj malgrandaj fabrikoj aŭ institucioj povas kelkope teni tian rilaton kun unu komunumo. Ĉiujare la diplomitoj de la mezlernejoj estas senditaj de la unuoj de iliaj gepatroj al la koncernaj komunumoj por kolektive instaliĝi al la kultivejoj, forstokulturejoj kaj teplantejoj de komunumoj kaj brigadoj. En la ordinara tempo la gejunuloj laboras tie, sed en la tempo de printempa transplantado kaj aŭtunaj rikolto kaj semado, ili laboras kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de produktaj taĉmentoj. La komunumo speciale sendis kelkajn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kun alta klasa konscio, bona ideologia kvalito kaj riĉa sperto en produktado por gvidi ilin en laboro, lernigi ilin pri agrikulturaj scioj kaj helpi ilin starigi regularon de lernado pri politiko, teorio, tekniko kaj kulturo. Krome, por venki malfacilojn en la vivo, la nomitaj kamparanoj kune kun ili kulturas legomojn, bredas porkojn kaj preparas manĝajojn. La fabrikoj ankaŭ sendas tien gelaboristojn por manĝi, loĝi kaj labori kune kun la gejunuloj kaj helpi la komunumojn kaj brigadojn bone aranĝi tiun laboron.

La supre menciita metodo estis trovita de la partia komitato de la urbo Ĝuĝoŭ en la jaro 1971 dum la vizito farita de diversaj rondoj de la urbo al la intelektaj gejunuloj. En tiu tempo 17 intelektaj gejunuloj laborantaj en la Ĉunfeng-a Teplantejo de la Tajhu-a Popolkomunumo ko-



*Sciencesplora grupo de intelektaj gejunuloj de Gaŭfu-brigado klopodas por ekstermi rizajn fiinsektojn.*




*Murgazeto redaktita de la intelektaj gejunuloj*

lektive vivis, laboris kaj lernis vivecplene, kio estis oportuna por disvolvo de ilia aktiveco en ĉiuj flankoj kaj reedukado farata de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al ili. Resuminte tiun sperton kaj farinte multan enketadon, la partia komitato de Ĝuĝoŭ decidis disvastigi la metodon tra la tuta urbo. Tiu faro pliintimigas la rilaton de la laboristoj kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ebligas al la Partio, registaro, armeo, popolo kaj lernejo ĉiuj prizorgi la kreskadon de intelektaj gejunuloj kaj la socialismajn revolucion kaj konstruadon en la kamparo. Ekzemple, la Honghianggiang-a Maŝinfabriko havas konstantan rilaton kun sep komunumoj kaj ĉiujare sendas centojn da gefiloj de siaj laboristoj kaj oficistoj al tieaj 40 loĝpunktoj de intelektaj gejunuloj. La partia komitato de la fabriko ĉiam zorgas pri gejunuloj irintaj al la kamparo dum resumado aŭ aranĝado de siaj laboroj. Ĝi multe prizorgas iliajn fiziklaboron, lernadon, vivon kaj amuzajn aktivadojn. Krom la speciala oficejo de la fabriko por zorgi ĉiutagajn aferojn de intelektaj gejunuloj, ĉiu laborejo, sekcio kaj grupo de ĝi havas profesian aŭ kumulan laboranton por zorgi tiun laboron. Por instigi ĉiujn fakojn doni sian zorgon, la partia komitato de la fabriko difinis bonan kondukadon de tiu laboro kiel unu el la kondiĉoj por elektiĝi kiel avangardaj kolektivoj. Ankaŭ la sindikato, la Komunisma Junulara Ligo kaj la Komitato de Laboristinoj de la fabriko prenas tiun laboron kiel sian gravan taskon en sia tagordo. Ekzemple ili helpis la loĝpunktojn de intelektaj gejunuloj en starigo de legoĉambro, disvolvo de artaj kaj sportaj aktivadoj kaj mobilizis laboristojn kaj oficistojn por donaci librojn al ili. En la jaro 1974 la fabriko unufoje donacis 12,000 ekzemplerojn da diversaj libroj, pli ol 700 sportajn instrumentojn kaj muzikilojn inkluzive de kor-



*Aro da intelektaj gejunuloj aliĝas al la Komunisma Junulara Ligo.*


bopilkoj, volejbaloj, volanoj, tablotenisaj pilkoj, ŝakoj, violonoj, flutoj, tamtamoj kaj tamburoj, kaj pli ol 20 barbirajn ilarojn.

Laŭ sia reala kapablo ĉiuj unuoj de la urbo klopodas fari sian kontribuon por akceli la movadon de irado de gejunuloj al la kamparo kaj de malsamaj flankoj zorgas kaj subtenas ilin. Iuj unuoj posedantaj materiajn kaj teknikajn fortojn helpas la komunumojn kaj brigadojn starigi loĝpunktojn de intelektaj gejunuloj kaj disvolvi la agrikulturan produktadon; la institucioj, lernejoj kaj sciencesploraj fakoj sendas siajn laborantojn al tiaj loĝpunktoj por lernigi la gejunulojn pri teorio kaj tekniko; kaj la medicinaj kaj higienaj fakoj trejnas nudpiedajn kuracistojn por la loĝpunktoj. La Ĝuĝoŭ-a Kompanio de Produktaj Rimedoj havas konstantan rilaton kun Ŝantang-brigado de Vangŝivan-komunumo, kie fiziklaboras pli ol 20 gefiloj de la laboristoj kaj oficistoj de la kompanio. Informiĝinte de la intelektaj gejunuloj kaj ilin gvidantaj laboristoj, ke post tri ĝis kvin jaroj tiu brigado rikoltos grandan kvanton da senkernaj mandarinoj kulturitaj de la gejunuloj, sed mankos al ili paka rimedo, la kompanio sendis laborantojn por enketi tiun aferon. Por solvi tiun problemon la kompanio dufoje transportis de Guangdong 21,000 bambuidojn al la loĝpunkto de la gejunuloj. Post la transplantado la bambuidoj rapide kreskas kaj povos esti utiligataj por plekti korbojn post tri ĝis kvin jaroj. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj

kortuŝiĝis kaj diris: "La kamaradoj de la kompanio faris kion ni eĉ ne pensis, kaj ili tutkore subtenis agrikulturon per transporto de la bambuidoj de milo da kilometroj fore." Laboristoj diris: "Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne nur konkure faras kontribuon al la ŝtato en malfacilaj kondiĉoj, sed ankaŭ zorgas pri la edukado de niaj gefiloj, tial ni devas pli multe fari por subteni agrikulturon." La Ĝuĝoŭ-a Elektrejo havas konstantan rilaton kun la Huanglong-a Komunumo. Informiĝinte, ke fiinsektoj atakas ties rizplantojn, ĝi tuj sendis sep elektristojn al la komunumo por kune fari ekstermadon. Tiuj laboristoj batalis du tagnoktojn kaj plenumis la instaladon de pli ol 300 nigraj lampoj, tiel ke oni ĝustatempe ekstermis la fiinsektojn. Sennombraj estas similaj kazoj en Ĝuĝoŭ.

La metodo teni konstantan rilaton inter urbaj fabrikoj kaj kamparaj komunumoj por kune instali intelektajn gejunulojn en novan kolektivan vivon ne nur fortigis la rilaton inter la urbo kaj la kamparo kaj la aliancon de la laboristaro kaj la kamparanaro, sed ankaŭ multe utilas al la subteno de industrio al agrikulturo kaj antaŭenpuŝas la agrikulturan produktadon. En la lastaj jaroj la komunumoj kaj brigadoj de Ĝuĝoŭ-regiono fondis, sub helpado de la urbaj fabrikoj, riparejojn de agrikulturaj maŝinoj, prilaborejojn de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, kalkpreparejojn, feraĵfabrikojn, bakejojn de brikoj kaj tegoloj, kaj mezajn kaj malgrandajn hidroelektrejojn. Tio rapidigas disvolviĝon de meĥanizado, akvoutiliga konstruado kaj elektrizo en la kamparo kaj akumulis kapitalon por komunumoj kaj brigadoj.

En la lastaj tri jaroj intelektaj gejunuloj de Ĝuĝoŭ sin hardis en la vasta kamparo kaj batalis por reformi la naturon, en kio ili ne nur altigis sian klaskonscion kaj fortikigis sian korpon, sed ankaŭ forstumis 40,000 hektarojn da taksusoj kaj fruktarboj. Antaŭ la granda kultura revolucio multaj montetoj de Ĝuĝoŭ-regiono estis kalvaj. Nun, sub la direktado de malriĉkampara-



*Maljuna malriĉkamparano lernigas al la intelektaj gejunuloj stucadon de fruktarboj.*

noj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la intelektaj gejunuloj kulturis novajn kaj reformis malnovajn arbarojn. Dank' al tio aperis arbaroj de taksusoj kaj sasafrasoj ĉiu kun areo de mil hektaroj, ĝardenoj de fruktarboj, tearboj kaj bambuoj ĉiu kun areo de cent hektaroj kaj kulturejoj de kuracherboj ĉiu kun areo de dekoj da hektaroj. Multaj gejunuloj akiris bonajn sukcesojn en sciencaj agrokulturado kaj forstumado, aplikante sian lernitan scion en kombino kun produkta sperto de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la vasta kamparo de Ĝuĝoŭ-regiono nun estas starigita la agronomia reto de tri niveloj kun partopreno de intelektaj gejunuloj. Ĝi jam faris ĝeneralan enketadon pri la grundo de multaj komunumoj kaj brigadoj, tio metis bonan bazon por agrikultura pliprodukto.

En la kampara vivo la intelektaj gejunuloj uzas la plejparton de sia tempo post la ĉiutaga laboro por lerni politikon, kulturon, teknikon kaj sciencajn sciojn. En studado de la teorio pri la diktaturo de la proletaro, en kritikado kontraŭ reviziismo kaj kapitalismo, pli ol 2,000 gejunuloj fariĝis aktivuloj de lernado de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj laboras kiel teoriaj helpantoj-instruistoj de la postlaboraj politikaj vesperlernejoj de komunumoj kaj brigadoj. Krome la intelektaj gejunuloj organizis pli ol 300 sportajn teamojn kaj pli ol 120 amatorajn kulturajn propagandajn taĉmentojn, kiuj ofte prezentas artajn programerojn por brigadoj kaj tiel vigligas la kulturan vivon de la kamparo. En la jaro 1975, la sporta teamo de la intelektaj gejunuloj de Bajguan-komunumo kiel avangarda sporta reprezenta teamo de intelektaj gejunuloj irintaj al la kamparo partoprenis en la Tria Tutlanda Sporta Kunveno okazigita en Pekino.


La intelektaj gejunuloj de Ĝuĝoŭ rapide progresas en la vasta kamparo, sub zorgado de diversnivelaj partiaj komitatoj kaj helpado de laboristoj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. El ili pli ol 50 glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, pli ol 3,500 fariĝis membroj de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo kaj pli ol 700 elektiĝis kiel estraranoj de diversaj niveloj. Kaj ili ankoraŭ ĉiam partoprenas en fiziklaboro kaj batalas en la kamparo kune kun la aliaj intelektaj gejunuloj.



*Laboristoj de la Honghianggiang-a Maŝinfabriko riparas agrikulturajn instrumentojn en Ĉangba-komunumo.*

# Notoj pri loĝpunktoj de intelektaj gejunuloj

de RAPORTISTO DE EPĈ




*Loĝpunkto de intelektaj gejunuloj de la forstumejo de Longgang-komunumo*

SE oni iras viziti Ĝuĝoŭ-ajn intelektajn gejunulojn fiksloĝintajn en kamparo kaj kontakti tiujn dekmilojn da novaj kamparanoj, ili certe estas inspirataj de ilia viveoplena kaj enhavoriĉa vivo kaj iliaj kontribuoj en forstumado kaj scienca terkulturado per siaj manoj por la konstruado de la nova socialisma kamparo.

### VIVADI KIE REVOLUCIAJ MARTIROJ IAM BATALIS

Irinte en la kunvenejon de la loĝpunkto de intelektaj gejunuloj en la forstumejo de Lejgiakiaŭ-brigado de Honghian-komunumo, oni tuj rimarkas la okulfrapan murgazeton bele redaktitan kaj ilustritan. Ĝi enhavas plurajn rubrikojn kiel "Kritikoj", "Komprenaĵoj el Studo", "Resumo de Sperto", "Poemoj" ktp. En la rubriko "Kritikoj" de la numero vidita de mi publikiĝis artikoloj kiuj koncentre kritikas la reviziisman linion de Deng Hiaŭping, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon; la rubriko "Resumo de Sperto" diskutas kaj resumas sperton en agrikulturo kaj forstumado; en la rubriko "Poemoj" aperis viveoplenaj versaĵoj pri la batala vivo de la intelektaj gejunuloj. Tiu murgazeto estas kune redaktata de diversaj studgrupoj kaj aperas unufoje en ĉiu monato.

Ambaŭflanke de la rubriko "Poemoj" estas versparo skribita en brilaj koloroj plena de heroismo:



*Intelektaj gejunuloj de teplantejo iras al laboro.*

*Farinda estas mult' por ŝanĝo de l' naturo,*
*Luktplena estas nia viv' en la kamparo.*

Lejgiakiaŭ estas neordinara loko de Ĝuĝoŭ. En 1927, sub la gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, ŝtorme disvolviĝis la kamparana movado de Hunan. La kamparana insurekcio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, simile al uragano, balais ĉiajn putrajn fortojn de feŭdismo en la kamparo. Lejgiakiaŭ estis tiutempe unu el la centraj distriktoj de la insurekcia aktivado de kamparanoj. La domo de la nuna kunvenejo de la intelektaj gejunuloj tiam estis elementa lernejo, kies ununura instruisto estis subtera kompartiano prizorganta sekretan komunikadon de la insurekcia armeo. Pro perfido de Ĉen Duhiu, la tiama gvidanto de la Centra Komitato de la Partio, al la revolucio, la kamparana movado de Hunan fiaskis. La reakciularo freneze arestis kaj mortigis kompartianojn kaj soldatojn de la insurekcia armeo. Nemalproksime en la sudo de la loĝpunkto de la gejunuloj, reakciuloj siatempe masakris en unu fojo pli ol 300 kompartianojn kaj insurekciajn soldatojn. Du pliaĝaj fratoj de maljuna malriĉkamparano Luo Ŝijoŭ, kiu traktas la intelektajn gejunulojn kiel siajn proprajn gefilojn, estis buĉitaj de klasaj malamikoj tiuloke en 1927, pro ilia aliĝo al la Komunista Partio kaj al la kamparana insurekcia armeo.

Vivante en la loko, kie batalis revoluciaj martiroj, la gejunuloj profunde komprenis malfacilecon kaj severecon de la revolucia batalo en la pasinteco. La batala spirito de la revoluciaj martiroj forte stimulas la gejunulojn, ke ili daŭrigu la revolucion kaj stafete transportadu la ruĝan standardon de generacio al generacio. En

strikta ligo kun la praktikado de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, la intelektaj gejunuloj avide lernas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson kaj senĉese altigas sian kapablon por distingi reviziismon. Ili ĉefe memlernas kaj kelktempe kune diskutas revolucian teorion. Kelkiam ili ankaŭ prezentas artajn programerojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Kiel kolektivo la loĝpunkto de intelektaj gejunuloj havas sian sezonan lernoplanon kaj konkrete aranĝas la studadon de ĉiu monato. La studaj aktivadoj estas farataj tute sur bazo de memvolo. La gejunuloj jam kutimiĝis al notado kaj skribado de siaj komprenaĵoj dum legado kaj ofte skribas artikolojn kaj poemojn por la murgazeto.

La studa aktivado de la loĝpunkto de gejunuloj en la forstumejo de Lejgiakiaŭ-brigado estas miniaturo de tiaj punktoj starigitaj en la forstumejoj, tearbaj kultivejoj kaj agrikulturaj kultivejoj de pli ol 400 brigadoj de Ĝuĝoŭ. "Ankaŭ la kamparo estas granda lernejo," foje diris al ni Li Vejlu, membro de la partia filio de la brigado kaj kadro elektita de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por gvidi intelektajn gejunulojn, kiu tre fervore servas al la gejunuloj. "Ĉe la loĝpunkto, la gejunuloj ricevis plenampleksan disvolviĝon en moralo, klereco kaj fiziko, kaj tio ŝtopis multajn breĉojn de la lerneja edukado."

## KLASA EDUKO — ĈEFA LERNOBJEKTO

La 19 intelektaj gejunuloj, kiuj kolektive fiksloĝiĝis en forstumejo de Hinglong-brigado de Huanglong-komunumo sudokcidente de Ĝuĝoŭ, ricevis taskon asignitan de la partia filio de la brigado baldaŭ post sia alveno, nome fari socian enketadon. La sekretario de la partia filio diris al ili: "Por partopreni en socia klasbatalo, vi devas koni la rilatojn inter la klasoj de la socio, vi devas koni ne nur la nunon sed ankaŭ la pasintecon. Enketo pri la pasinteco multe profundigos vian konon kaj sciojn pri la nuna kamparo."

Ricevinte taskon de socia enketado, la gejunuloj vizitis en postlaboraj horoj familiojn de maljunaj malriĉkamparanoj, kiuj suferegis en la malnova socio, kaj petis la lastajn rakonti al ili siajn travivaĵojn en la malnova socio. Foje la malriĉkamparano Ven Joŭcaj rakontis al ili sian mizeran vivon en la pasinteco. Lia patrino mortis, kiam li estis nur 4-jara, lia patro freneziĝis pro turmentado de la suferoj en la malnova so-

*La hejmo de intelektaj gejunuloj de la forstumejo de Huanglong-komunumo*



*Intelektaj gejunuloj studas teorion kune kun komunumanoj en vespera politika lernejo.*



cio, kaj li devis almozpetadi kondukante sian frenezan patron kaj poste labori kiel dungito de bienulo pli ol dek jarojn antaŭ la Liberiĝo. La gejunuloj kun larmoj en la okuloj aŭskultis la rakontadon kaj sentis senliman malamon al la ekspluata sistemo kaj la bienularo de la malnova socio. Farinte enketadon pri la kamparo en la malnova socio, la gejunuloj kvazaŭ eniris nekonatan mondon, kiu estis terure malluma kaj abomeninda kaj tre kruele suferigis la malriĉajn kamparanojn de Ĉinio. Dank' al tio la intelektaj gejunuloj ricevis novan komprenon pri socio, historio, klasoj kaj klasbatalo; tia leciono estas multe pli impresiva, viveca, riĉa kaj profunda ol tiuj en lernejo. Ili komprenis ankaŭ, kiom multe da scioj estas lernindaj en la granda lernejo — la kamparo, eĉ krom tiuj pri la naturo.

En ricevo de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la intelektaj gejunuloj devas preni klasbatalon kiel la ĉefan lernobjekton. La intelektaj gejunuloj kolektive fiksloĝantaj en la popolaj komunumoj en la ĉirkaŭurbo de Ĝuĝoŭ estas klopodantaj por bone lerni tiun studobjekton per diversaj formoj, same kiel la intelektaj gejunuloj de Hinglong-brigado. Iliaj pensoj, sentimentoj kaj vivstilo iom post iom ŝanĝiĝis. Ili laboris kune kun komunumanoj sen timo al malpureco kaj laco. Per siaj agoj ili forte kritikis la putran ideon "lerni por fariĝi mandareno", distrumpetitan de ekspluataj klasoj dum miloj da jaroj.

"Ni ne estas kaj neniam fariĝos spiritaj aristokratoj! Ni estas ordinaraj laboruloj kaj juras esti akcelantoj de limigo de la burĝaj rajtoj kaj redukto de la diferencoj inter la laboristoj kaj kamparanoj, inter la urbo kaj la kamparo kaj inter la cerba kaj fizika laboroj!" En la rubriko "Kritikoj" de la murgazeto, gejunuloj rezolute esprimis sian decidon rompi kun la malnovaj tradiciaj konceptoj.

## ŜANĜI LA FIZIONOMION DE LA KAMPARO

En la kamparo ĉirkaŭ Ĝuĝoŭ cirkulas kortuŝaj rakontoj pri pena luktado de la intelektaj geju-

nuloj por konstrui kampojn kaj forstojn sur la kalvaj montoj. Konkero de Lejgong-monto estas unu el ili.

En la forstumejo de Nan-an-brigado de Nanjangkiaŭ-komunumo troviĝas kalva monto nomata Lejgong. En la pasinteco, oni diris, ke sur tiu monto povas kreski nek herbo nek arbo, kaj birdoj ne haltas kaj musoj ne nestas.

Ĉu oni povas igi la kalvan monton liveri al la popolo lignon kaj grenon?

La intelektaj gejunuloj diris heroe: "Aliiĝis la epoko kaj la popolo havas fortojn por ŝanĝi la naturon!"

La ekspluatado de Lejgong-monto estis malfacila batalo, en kiu oni konkuris je forteco de volo kaj grandeco de entuziasmo. Por la urbaj gejunuloj ĝi estis vere nova kaj peniga.

Je la kvara horo en vintra mateno, kiam la tero estis kovrata de prujno, ili jam komencis fosi sur la monto. La junulinoj en ĉemizo kaj la junuloj en trikota veŝto ŝvitadis pro penlaborado. Duono de la klingoj de pli ol 50 pioĉoj estis forfrotita kaj la gejunuloj ankoraŭ fosadis senĉese. Per penlaborado en unu tuta vintro, ili fosis 2,000 kubmetrojn da tero kaj formis multajn ŝtupajn kampojn sur Lejgong-monto.

Por planti mandarinajn arbidojn, la gejunuloj fosis pli ol 2,000 kavojn kun diametro kaj profundeco de 1 metro, kaj portis en ilin ŝlimon el lagetoj sub la monto. Ili laboregis pli ol 2 monatojn, forportis la ŝlimon el 4 lagetoj en la ĉirkaŭaĵo, alportis 16,000 korbojn da herboza tero kaj kolektis amason da balaaĵo en urbeto por doni sufiĉe da baza sterko al la arbidoj.

Tio okazis antaŭ pli ol 2 jaroj, kaj nun la deklivoj de Lejgong-monto jam estas kovritaj de netaj vicoj de arboj de senkerna mandarino. En aprilo kaj majo, kiam la arboj floras, ili ellasas ebriigan aromon. Ŝanĝiĝis Lejgong-monto, vekiĝis la kalva monto dorminta jam milojn da jaroj kaj ĝi staras nun antaŭ niaj okuloj kun fizionomio senprecedence bela.

Foje en poem-deklama kunveno, iu malriĉkamparano de Ŝantang-brigado de Vangŝivan-komunumo legis jenan poemon:

*La intelektaj gejunuloj estas vere bravaj,*
*heroe ili bataladis kontraŭ ondoj plaŭdaj,*
*kluzpordon ili pene ŝtopis kun mortospitemo;*
*plantidojn ili savis kaj ni laŭte ilin laŭdas.*

La 20-an de majo 1975, subite ŝveliĝis unu el la ĉefaj riveroj de Hunan-provinco Hianggiang-rivero pro pluvegado en pluraj tagoj en la supra



*Intelektaj gejunuloj ludas programeron verkitan de ili mem.*

baseno. En tiu kriza tempo, la kluzpordo de Ŝantang-brigado en la digo difektiĝis kaj ne povis esti strikte fermita. Pro tio la centoj da hektaroj da rizplantoj de Ŝantang-brigado estis minacataj de atako de la torente enlasita riverakvo, kaj ankaŭ centoj da hektaroj da rizplantoj de najbara brigado estis minacataj de subakviĝo.

Informiĝinte pri tio, la pli ol 20 intelektaj gejunuloj de la forstumejo de Ŝantang-brigado tuj rapidis al la kluzpordo kunportante matojn, pajlajn sakojn kaj tabulojn por helpo. Sed la fendo estis ĉe la malsupra parto de la kluzpordo. Kion fari do? Ĉu salti en la akvon por ŝtopi la fendon aŭ retiriĝi antaŭ la malfacilaĵo kaj lasi la torenton engluti la rizplantojn? Haŭ Guangvej, Huang Kikiang kaj aliaj du intelektaj junuloj senhezite saltis en la akvon por ŝtopi la fendon. Sub helpado de la gejunuloj sur la bordo ili pene luktis pli ol 3 horojn kaj fine sukcesis ŝtopi la fendon, tiel ke saviĝis centoj da hektaroj da rizplantoj.

Tia revolucia spirito de sentimeco de la intelektaj gejunuloj estis elkulturita en la klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Depost la fondo de la loĝpunkto de intelektaj gejunuloj en 1974, ili spertis atakon de klasaj malamikoj kaj estis harditaj en la fizika laboro por konstruado de vastaj taksusaj kaj sasafrasaj arbaroj. Dank' al tio iliaj pensoj kaj laborstilo fariĝis ĉiam pli bonaj.

La vigla kaj enhavoriĉa batala vivo kreskigis ilian kapablon kaj ilian intereson pri literatura kaj arta aktivado. Nun ĉe tiu loĝpunkto de intelektaj gejunuloj ofte okazas amuzvespero kaj poemdeklama kunveno. Por esprimi sian firman decidon fari revolucion dum sia tuta vivo en kamparo, la supre menciita Haŭ Guangvej verkis la suban poemon kaj estis laŭdita de komunumanoj:

*Mi ne vivos kiel efemera lotusfloro,*
*sed kiel ĉielskrapanta pin' mi staros.*
*Fiksloĝante en kampar' dum ĉiu vivo-hor' de*
*sesdek jaroj mi revolucion daŭre faros.*

*Intelektaj junuloj en korbopilkado*



# Nova paŝtistino sur altebenaĵo

de tibeta laboristo **HIE JINGKIN**



*Sur vasta step' kun ĉarmaj floroj,*
*jen kantas ĝoje el la koro*
*knabino vipon svingadante,*
*kaj nuboj brilas en aŭroro.*

*Ŝi plenkreskiĝis en Pekino,*
*nun nestas en la stepa sino;*
*por ĉiu herbo de ĉi loko*
*profundas ŝia korinklino.*

*La step' dezertas ja laŭ famo,*
*sed ĵuris ŝi kun granda amo:*
*"Belegan bildon mi elpentros*
*per miaj laboremaj manoj."*

*"La step' frostegas," iuj plendas,*
*ŝi tamen grandan varmon sentas:*
*"En mia koro ardas fajro,*
*glacion, neĝon ĝi preventas."*

*Migradas ŝi trans montegaron*
*por satmanĝigi la ĉevalojn!*
*Transvadas ŝi vastegan lagon*
*por bone paŝti la ŝafaron!*

*Montgrimp' fortigas la muskolojn,*
*lag-akv' vigligas ŝian koron,*
*ŝi lernas de Daĝaj en paŝto*
*kaj ĉie faras ŝvitlaboron.*

*Ŝi ĝojas pro la grasaj ŝafoj,*
*ĉevaloj kaj la manaj kaloj.*
*Je palpo de l' brakbend'* antaŭa*
*ŝi fortoplenas kiel ŝtalo.*

*La stepo estas forn' giganta,*
*en ĝi hardiĝas ŝi strebanta;*
*ŝi havas nun jam ŝtalajn ŝultrojn*
*kapablajn ja por ŝarĝo granda.*

---

**Tio estas la brakbendo de la ruĝa gvardio.*

# Lerni en praktiko

EN aprilo de 1974 mi kaj miaj kunlernantoj venis al forstumejo de Kjunfeng-komunumo de Ĝuĝoŭ-gubernio por tie kamparaniĝi kaj akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj tie oni bonvenigis nin per tamtamado kaj tamburado. La partia organizo de la forstumejo kaj tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj multe zorgis nin kaj esperas ke ni kontribuos al konstruado de la nova socialisma kamparo. Post nelonge la gvidantoj de la forstumejo decidis, ke mi partoprenu en la sciencoesplora grupo de la forstumejo kaj mi kun ĝojo akceptis tiun taskon.

Post veno al la forstumejo ni aŭdis multajn parolojn de tieaj kamparanoj pri monta termito. Ili diris al ni, ke monta termito kvazaŭ "sen-



*Esplorado pri montaj termitoj*

denta tigro" estas morta malamiko de taksuso. Ĝi ronĝas ŝelon, foliojn kaj trunkon de taksuso kaj iam eĉ povas mortigi fine arbojn. Monta termito havas fortan generan povon kaj povas demeti dekmilojn da ovoj en unu diurno. Ĉar ĝia movado estas kaŝita, estas malfacile trovi ĝin kaj multe pli malfacile ĝian ĉefan neston. En tiu stato, malmultaj homoj, kiuj iom scias metodon kontraŭ termitoj, tamen havas fortan inklinon al kapitalismo, rigardis sian kapablon kiel kapitalon por sin riĉigi. Aŭdinte tion, ni profunde konsciis nian devon kaj ĉiuj volis kiel eble plej rapide solvi la problemon.



*Dank' al kulturado de la laboristaro kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, intelekta junulo Kian Hinvu fariĝis specialisto pri ekstermo de termitoj.*

Rapide disvolviĝis la aktivado de nia sciencoesplora grupo. Nia unua laboro estis observi kaj esplori la movadon de termitoj. Ĉiutage ni eliris frumatene, revenis malfrue, kaj vagadis sur montoj por serĉi spurojn de termito. Forpasis jam 5 tagoj, tamen ni nenion trovis. Mi iom deprimiĝis kaj pensis en mi: "Tiu malgranda insekto vere estas malfacile forigebla, kaj nia klopodo eble estos tute vana." Rimarkinte mian malpaciencon la gvidanto de la forstumejo kuraĝigis min: "Neniom deprimiĝu pro la malfacilo. Nur se vi persistos en praktiko, vi certe sukcesos." Vespere mi malfermis mian taglibron kaj en miajn okulojn ensaltis vortoj de la revolucia instruanto Marks: **"En sciencoj ne estas glata vojo por iri. Nur tiu, kiu ne timas lacon en grimpado sur zigzaga vojeto, havas esperon atingi la brilan kulminon."** La instruon de Marks mi notis en mian taglibron, kiam mi lernis en mezlernejo. Tiam mi jam decidis diligente lerni sciencon por kontribui al la socialisma konstruado.

En 1973, kiam mi finis mian lernadon en alta mezlernejo kaj devis iri al nova vivo, mi frontis alternativon, iri kune kun miaj kunlernantoj al la kamparo por tie labori kiel kamparanoj, aŭ labori en kompanio kie laboras mia patro. Tiam mi pensis, ke labori en urbo kompreneble estas ankaŭ bezono de la revolucio, sed en la kamparo, la kondiĉoj estas pli malfacilaj, kiuj povas hardi homojn, kaj tie gejunuloj povas multe fari. Intelektaj gejunuloj iras al la kamparo por tie kamparaniĝi, tio estas socialisma revolucio de ĝisfunda rompo kun malnova tradicia koncepto, kaj mi devas per mia agado partopreni en tiu revolucio. Mi do senhezite forlasis la urbon, venis en la kamparon kaj decidis dediĉi mian tutan vivon al la konstruado de la nova socialisma kamparo. Hodiaŭ, mi

renkontis malfacilon en la komenco de mia nova batala vojo, ĉu mi devas halti pro tio? Ne! Revolucia junulo devas esti batalanto kuraĝa en grimpo sur monto. Mi kaj aliaj membroj de la grupo serioze studis la filozofian verkon de Prezidanto Maŭ «Pri Praktiko» kaj pli klare komprenis, ke por fari sciencan eksperimenton oni devas havi ne nur entuziasmon, sed ankaŭ rigoran sciencan sintenon. De tiam ni tre atentis komparon de scioj akiritaj el libroj kun la reala observado. Tage ni observis movadojn de termitoj sur montoj kaj vespere ni studis sciencajn materialojn kaj analizis la tagan observadon.

Majo estas plej aktiva tempo por termitoj kaj ankaŭ plej okupata tempo por ni en nia esplora laboro. En tiuj tagoj ni matene kaj vespere iris sur montojn por fari observadon. Monta termito malŝatas lumon, elrampas malofte en tago sed ofte en nokto por serĉi nutrajon. Por koni ilian spuron mi ofte observadis ĝis profunda nokto. Ripetada observado riĉigis nian perceptan scion kaj konigis al ni kelkajn kutimojn de termitoj. Kiam ni elfosis la unuan kompletan termitejon, ni sentis eksterordinaran ĝojon.

La unua sukceso multe kuraĝigis nin. Poste, ĉiufoje kiam ni elfosis termitejon mi faris detalan pririgardon kaj iafoje desegnis la galerietojn kaj ĉefan neston de termitoj kaj faris atentan mezuron kaj registron por koni iliajn kutimojn. Dank' al la esplorado ni rimarkis, ke la montaj termitoj ŝatas nesti en lokoj kun alta temperaturo, humida aero kaj sufiĉa lumo, vintre ili sin kaŝas en nesto. En noktoj de majo kaj junio, precipe post pluvo, ili elrampas el sia nesto kaj serioze damaĝas arbojn kaj agrikulturajn plantojn. En la lastaj jaroj ni plene uzis tiun tempon por elfosi montajn termitojn. Ni ankaŭ faris multajn specimenojn de montaj termitoj, daŭre esploris kaj observis kaj fundamente mastris metodojn por ekstermi montajn termitojn kun flavaj flugiloj, termitojn kun nigraj flugiloj kaj domtermitojn, plej serioze damaĝantajn en la loko. De 1974 ni ekstermis grandan kvanton da montaj termitoj, kaj per tio garantiis sanan kreskon de taksusoj.

Por pli bone lerni de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj samtempe uzi la lernitan scion en produktado, ni iras tien kie ni estas bezonataj. Foje, iu brigado telefonis al nia forstumejo, ke tie termitoj damaĝas akvomelonojn, kaj petis nin helpi ilin ekstermi termitojn. Ni iris tien kaj vidis, ke en vasta parcelo iuj akvomelonoj surhavas grandajn truojn faritajn de termitoj, kaj aliaj eĉ perdis la tutan internajon. La kamparanoj diris al ni, ke rimarkinte termitojn ili ĉiamaniere klopodis por ekstermi la fiinsektojn, tamen ne sukcesis, kaj pro tio ili tre maltrankviliĝis. Laŭ la spuroj montritaj de la komunumanoj kaj tieaj temperaturo, humideco kaj direkto de vento, nia sciencoesplora grupo trovis vojon de termitoj kaj rapide ruinigis la ĉefan termitejon. Samtempe ni meminiciate konigis al ili teknikon kaj atentindajn problemojn en ekstermado de termitoj. Poste la komunumanoj mem elfosis nemalmultajn termitojn. La praktiko de la amasoj liveris al nia scienca eksperimentado bonan sperton.

Dum esplorado pri metodoj kontraŭ termitoj ni ankaŭ trovis rimedojn kontraŭ folivolvaj insektoj sur taksuso, putriĝo de radikoj de katalpoj kaj aliaj fiinsektoj kaj atingis relative bonan efikon. La praktiko pluapaŝe konigis al mi, ke la kamparo estas granda lernejo, kie estas neelĉerpeblaj scioj kaj nefinfareblaj aferoj. Mi decidis kune kun aliaj intelektaj gejunuloj daŭre hardiĝi kaj lerni en tiu vasta mondo kaj diligente klopodi por disvolvi la forstuman aferon de la patrolando kaj konstrui la novan socialisman kamparon.



# Ili estis ruĝgvardianinoj siatempe

Antaŭ ekflugo





Ĉe starta linio sur la aerodromo viveeplenaj pilotinoj kvazaŭ ekflugontaj agloj atendas ordonon. Ili, ruĝgvardianinoj antaŭ kelkaj jaroj, nun estas pilotinoj de iu trupo de nia aera armeo.

Tiuj junulinoj kreskas sub prizorgoj de la Partio. En la Granda Proleta Kultura Revolucio ili diligente studis kaj armis sian kapon per Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso. Kiel ruĝgvardianinoj, ili ribelis kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. Kaj poste ili estis varbitaj en la armeon. Disvolvante la revolucian spiriton de la ruĝgvardianoj kuraĝe pensi, agi kaj sturmi, la junaj pilotinoj venkis malfacilojn unu post alia kaj pene sin ekzercas pri flugado por ekstermi malamikojn kaj defendi la patrolandon.



Ruĝgvardianinoj antaŭe.
pilotinoj nuntempe



Lasta ekzameno antaŭ ekflugo



Flegado al aviadilo



Inter novaj ruĝgvardianinoj

# Lernado de Daĝaj akcelas disvolviĝon de la ĉina agrikulturo

TRA la vasta teritorio de Ĉinio, rapide disvolviĝas la grandioza revolucia amasa movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo kaj ĝeneraligo de Daĝaj-tipaj gubernioj. Kiel en la agrikulturaj kaj fiŝadaj regionoj, tiel en la brutobredaj kaj forstokulturaj regionoj, ĉie oni studas kaj efektivigas la spiriton de la Tutlanda Konferenco de Lernado de Daĝaj en Agrikulturo, kritikas reviziismon kaj kapitalismon, energie konstruas socialismon kaj faras senprecedence grandskalan fundamentan konstruadon de kampoj. Tio markas, ke la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo en Ĉinio jam iris en novan gravan stadion.

En 1964, Prezidanto Maŭ faris la alvokon **"lerni de Daĝaj en agrikulturo"** kaj per tio montris al la centmilionoj da kamparanoj de la tuta lando la direkton en konstruado de socialisma agrikulturo. La Granda Proleta Kultura Revolucio akcelis disvolviĝon de la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo. En 1970 okazis la Konferenco pri Agrikulturo de Norda Ĉinio, kiu resumis kaj disvastigis la sperton de Hijang en konstruado de Daĝaj-tipa gubernio, kaj sekve

*Kampoj de Ŝigiaĝuang-regiono de Hebej-provinco*






*Rikoltado de tritiko en kultivejo, kie ofte inundis la Flava Rivero*

de tio tiu movado disvolviĝis ankoraŭ pli vaste, vigle kaj firmpaŝe. La movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo multe altigis la konscion de la centoj da milionoj da kamparanoj pri klas-batalo, batalo inter la du linioj kaj daŭrigo de la revolucio. Ĝi forte akcelis la disvolviĝon de la socialisma agrikulturo de Ĉinio kaj ebligis gajnon de riĉaj rikoltoj de greno en dekkelkaj sinsekvaj jaroj kaj aperon de granda nombro da Daĝaj-tipaj komunumoj kaj brigadoj kaj pli ol 300 avangardaj gubernioj en lernado de Daĝaj. Trafe oni tion priskribas per la figura esprimo: Ĉie floras ruĝaj Daĝaj-floroj.

## HISTORIA TURNIĜO

Giganta ŝanĝo okazis al la provincoj Hebej, Ŝandong kaj Henan kaj la regionoj de nordaj Giangsu kaj Anhuj, en la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo. Tiuj lokoj situas en la malsupra baseno de la Flava Rivero. Antaŭ la Liberiĝo, malsatego ofte turmentis la tieajn popolanojn, ĉar okazadis inundoj kaj sekegeco, kaj precipe pro tio, ke la Flava Rivero ofte ŝanĝis sian fluejon turnante multajn kampojn en sala-alkalajn kaj sablajn sovaĝejojn. Post la Liberi-




ĝo, la tiea agrikultura produktado ricevis certan disvolviĝon, sed la hektara produktokvanto estis malalta kaj la malsufiĉeco de greno ne estis radikale ŝanĝita ĝis la jaro 1970 kaj dum longa periodo la ŝtato devis transporti grenon de suda Ĉinio al tiuj lokoj.

En la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, la amasoj de tiuj lokoj sub la gvido de diversnivelaj partiaj komitatoj firme iris la socialisman vojon kaj energie faris fundamentan konstruadon de kampoj. Ili dragis la malsuprajn partojn de riveroj, riparis kaj plifortikigis digojn, konstruis akvokonservejojn, ŝtupajn kampojn kaj forstojn en la montregionoj en la supra baseno de riveroj kaj fosis putojn kaj irigaciajn kanaletojn kaj reformis salan-alkalan grundon sur la ebenaĵo. Dank' al ĉio ĉi tio tute renoviĝis la fizionomio de la tiea agrikulturo.

La ŝanĝoj en Gjunan-gubernio de Ŝandong-provinco estas ekzemplo pri tio. En la pasinteco, Gjunan-gubernio prenis Daĝaj nur kiel lernindan tipon de bona produktado kaj ĝia hektara produktokvanto de greno vagadis ĉirkaŭ 2,250 kg. Post la Konferenco pri Agrikulturo de Norda Ĉinio en 1970, la partia komitato de Gjunan-gubernio refoje lernis la sperton de Daĝaj en ligo kun la realaĵoj kaj komprenis, ke la plej grava sperto de Daĝaj lerninda por ĝi estas persistado de la fundamenta linio de la Partio, kritikado al kapitalismo kaj reviziismo kaj energia konstruado de socialismo. La komitatanoj iris profunde en produktajn taĉmentojn, starigis studrondojn kaj politikajn vesperajn kursojn, movis la kadrojn kaj komunumanojn por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj fari revolucian kritikadon kaj socialisman edukadon, dank' al kio la amasoj aktiviĝis kaj leviĝis alta tajdo de akvoutiliga konstruado por la kampoj. La kadroj kaj komunumanoj reformis ĉ. 26,000 hektarojn da malaltaj facile inundeblaj kampoj kaj konstruis pli ol 37,000 hektarojn da

*Sur draŝejo de Kianŝavan-brigado de Lajhi-gubernio de Ŝandong-provinco*





*Unu el la paŝtejoj de Interna Mongolio*

kampoj kiuj povas doni bonan rikolton malgraŭ sekegeco aŭ tro-abundo de pluvoj, tiel ke la meznombra hektara produktokvanto de greno de la tuta gubernio superis 5,250 kg.

En tiuj provincoj kaj regionoj aperis ne nur dekoj da avangardaj gubernioj inkluzive de Gjunan, Ĝengding, Pinggu, Gihian, Hujhian, Sukian kaj Hiaŭhian, sed ankaŭ regionoj de grandarea alta produktokvanto. Ekzemple, la 13 gubernioj kaj urboj de Hinhiang-subprovinco de Henan levis la totalan produktokvanton de greno je pli ol dek pocentoj ĉiujare ekde 1972; la meznombra hektara grena produktokvanto de la 18 gubernioj kaj urboj de Ŝigiaĝuang-subprovinco de Hebej superis 5,250 kg.; la meznombra hektara grena produktokvanto de la 17 gubernioj kaj urboj de Jantaj-subprovinco atingis 6,000 kg.

La loĝantoj kaj agroj de Hebej, Ŝandong, Henan kaj la nordaj partoj de Giangsu kaj Anhuj konsistigas respektive kvaronon de la tutaj loĝantaro kaj agraro de la tuta lando. En la lastaj jaroj, senĉese kreskis la grena produktokvanto de tiuj lokoj, kiuj ne nur ne plu bezonas grenon el suda Ĉinio sed eĉ havas superfluan grenon. Tiu historia turniĝo havas gravan signifon en politiko kaj ekonomio.

## NOVA KONTRIBUO DE LA LOKOJ ABUNDAJ JE FIŜOJ KAJ RIZO


La meza kaj malsupra basenoj de Jangzirivero estas malaltaj kaj ebenaj akvoriĉaj lokoj.

Tie rete interkruciĝas riveroj kaj dense dislokiĝas lagoj, kaj abunde produktiĝas rizo, tritiko, kotono, oleliveraj semoj kaj kanaboj. Kaj Guangdong kaj Guanghi sude de la kvin montaroj produktas krom la supre menciitaj ankaŭ sukerkanon, kaŭĉukon, ruĝan juton, juton kaj aliajn tropikajn kaj subtropikajn ekonomiajn planto-produktaĵojn. Tiuj provincoj ĉiuj estas idealaj por disvolvi agrikulturan produktadon. Sed en la pasinteco, la hektara produktokvanto de greno en tiuj lokoj estis nur ĉ. 2,250 kg. En la komenca periodo de la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, iuj opiniis, ke la produktaj kondiĉoj de Daĝaj en montregiono kaj tiuj de la akvoza regiono estas malsamaj kaj la sperto de Daĝaj estas neaplikebla en la lasta. Poste, ili profunde studis la instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj trovis, ke tia opinio estas erara. Ili komprenis, ke la vojo de Daĝaj estas nepre irenda por la ĉina agrikulturo, kaj la produktado povos kontinue kaj stabile disvolviĝi, nur se oni persistos en la fundamenta linio de la Partio, kritikos kapitalismon kaj reviziismon kaj firme iros la socialisman vojon same kiel Daĝaj-anoj. En la lastaj jaroj la diversnivelaj partiaj organizoj de Guangdong-provinco vaste faris edukadon pri la politika kaj ideologia linio en la kamparo, altigis la socialisman konscion de la vastaj amasoj de komunumanoj kaj multe rapidigis la progresadon de la agrikultura produktado. En 4 sinsekvaj jaroj la hektara grena produktokvanto de la tuta provinco jam atingis 6,000 kg., la kvanton difinitan de la Tutlanda Programo de Agrikultura Disvolvado por tiu regiono. En la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo ankaŭ Hunan-provinco multe ŝanĝiĝis. La ebenaĵo sur la bordo de Dongting-lago jam fariĝis bazo de komerca greno, ĉar tie retas irigaciaj kanaletoj, interkruciĝas forstozonoj kaj konstruiĝis elektraj pumpstacioj. La totala grena produktokvanto de la tuta provinco jam pliiĝis je pli ol 50 pocentoj kompare kun tiu de 1965.

La regiono apud Jangzi-rivero de Ŝanhajo, Giangsu, Anhuj kaj Gianghi kaj la ebenaĵo Hanggiahu en Ĝegiang estas fame konataj kiel belaj kaj riĉaj lokoj. Dank' al la movado de lernado de Daĝaj, la agrikultura produktado de tiuj lokoj jam leviĝis al nova nivelo. En la gubernioj de la antaŭurboj de Ŝanhajo vidiĝas bela sceno de socialisma moderna agrikulturo: Sur la vastaj ebenaj kamparoj etendiĝas elektrotransmisia reto, dislokiĝas multaj pumpstacioj kaj traktoroj kuras tien kaj reen. La antaŭurbaj 198 popolaj komunumoj fondis milojn da fabrikoj, kaj tiel formiĝis reto de entreprenoj de gubernioj, komunumoj kaj brigadoj por riparado kaj fabrikado de agrikulturaj maŝinoj. Ili jam povas produkti ĉiajn agrikulturajn maŝinojn escepte de traktoroj kaj aliaj grandaj agrikulturaj maŝinoj. Nun plantoflegado, degrajnigado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj estas plenumataj tute aŭ parte per maŝinoj; 88% de la kampoj estas plugataj per maŝinoj kaj 97% de ili estas irigaciataj per elektraj pumpiloj. Krome la komu-

*Riĉa rikolto de tritiko*






*Gvida kadro de Dongguan-gubernio de Guangdong-provinco klarigas al komunumanoj la taskon de agrara fundamenta konstruado en profunda disvolvo de la amasa movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo.*

numoj kaj produktaj brigadoj disvolvas amasan sciencan eksperimentadon kaj turnis la kampojn de du rikoltoj ĉiujare en tri-rikoltajn, tiel ke la meznombra hektara grena produktokvanto de Ŝanhajo leviĝis ĝis 10,800 kg. Per tio Ŝanhajo faris novan kontribuon al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

## ĜOJIGA NOVAĴO EL ALTEBENAĴO

Ekde la jaro 1974, Tibeto sur la tegmento de la mondo ne nur povas produkti sufiĉe da greno por sia konsumo kaj ne plu bezonas liveron de greno el aliaj lokoj, sed ankaŭ jam havas 6 avangardajn guberniojn, kiel Kionggie, Pulan kaj aliaj, en lernado de Daĝaj kun meznombra hektara produktokvanto de pli ol 3,000 kg. Tio estas ĝojiga novaĵo de Tibeto en la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo. La meznombra absoluta alteco de Tibeto estas pli ol 4,000 metroj, la tutjara senprujna periodo estas nur 160 tagoj kaj la naturaj kondiĉoj por agrikulturo estas tre malbonaj. Pro longa plenenergia propagando de la reakcia reganta klaso pri fatalismo, teokratio kaj aliaj feŭdismaj superstiĉaj pensoj, la tibetanoj estis ideologie katenitaj kaj ne kuraĝis batali kontraŭ la naturo. Post sia liberiĝo la miliono da tibetaj servutuloj senĉese altigis sian politikan konscion sub la edukado de la Partio, kaj precipe en la kultura revolucio ili lernis la revolucian spiriton de la popolo de Daĝaj, forte rompis fatalismon kaj teokratiajn ideojn kaj komencis grandan militiron kontraŭ la naturo sur la tegmento de la mondo. En ĉiu vintro, centoj da miloj da popolanoj partoprenas en diversaj akvoutiligaj konstruadoj por kampoj. Sub la piedo de la Neĝa Montaro ili fosis multajn irigaciajn kanaletojn, konstruis ŝtupajn kampojn kaj akiris riĉajn rikoltojn de hordeo, printempa tritiko kaj terpomo. Sur la Tibeta Altebenaĵo, kie oni neniam kulturis vintran tritikon, oni akiris riĉajn rikoltojn de vintra tritiko en lastaj sinsekvaj jaroj. Oni ne nur akiris bonan rikolton de vintra tritiko kun meznombra hektara produktokvanto de 3,000 kg., sed eĉ kreis la miraklon de hektara produktokvanto de 12,000 kg.

Sur la leŭsa altebenaĵo de nordokcidenta Ĉinio, kiu suferis de seriozaj trosekeco kaj erozio en la historio, la vastaj amasoj de komunumanoj, laŭ la ekzemplo de Daĝaj, konstruis ŝtupajn kampojn, akvokonservejojn, irigaciajn kanaletojn kaj pumpstaciojn por levi akvon kaj altigis la

produktokvanton de greno jaron post jaro. Depost 1970, Vubaŭ-gubernio de Ŝenhi-provinco reformis pli ol 1,400 valojn kaj pli ol 900 montetojn, tiel ke duono de la erozia areo estas eliminita kaj la totala produktokvanto de greno kreskis trioble kompare kun tiu de 1965. La provincoj Ŝenhi, Gansu kaj Kinghaj kaj la Ninghia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono jam povas produkti sufiĉe da greno por sia konsumo.

En la paŝta regiono de Interna Mongolio en la nordo ĝis Ninghia, Gansu, Kinghaj kaj Hingiang en la nordokcidento kaj Tibeto, kun longeco de miloj da kilometroj, la diversnaciecaj paŝtistoj faris novan paŝon en la movado de lernado de Daĝaj.

En la pasinteco, la popolo de la paŝtaj regionoj dependis nur de la naturaj paŝtejoj. Nun la paŝtistoj energie klopodas por ŝanĝi la naturajn kondiĉojn konstruante murojn el herbaj terblokoj, plantante salikojn por formi barilojn kaj praktikante alternan paŝtadon. Ili fosas putojn kaj irigaciajn kanalojn, kulturas herbojn grandkvante kaj kreas novajn paŝtejojn. Komunumanoj de sablaj lokoj kulturas forstojn por bridi venton kaj sablon kaj konstruis paŝtejojn. De la jaro 1972, la stepo de Hianghuang-hoŝo (= gubernio) suferis de naturaj katastrofoj grandaj kaj malgrandaj en ĉiu jaro, tamen stabile disvolviĝis la brutobreda afero de tiu loko, ĝia jara pliprodukta procento superis 27 pocentojn kaj pro tio ĝi fariĝis avangarda hoŝo en lernado de Daĝaj en la brutobreda regiono.

## AL NOVA CELAĴO

La Tutlanda Konferenco de Lernado de Daĝaj en Agrikulturo okazigita en la pasinta jaro estis kunveno kun granda skalo kaj profunda signifo. Ĝi revuis la sukcesojn atingitajn de post la komenco de la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, resumis kaj interŝanĝis sperton kaj elmetis la grandajn celaĵojn ĝeneraligi Daĝajtipajn guberniojn en la tuta lando kaj fundamente efektivigi meĥanizadon de nia agrikulturo en 1980. Tio montris la heroan aspiron de la ĉina popolo al pli rapida efektivigo de modernigo de nia agrikulturo.


*Agrara fundamenta konstruado en Luogi-komunumo de Hubej-provinco*



Ĝeneraligo de Daĝaj-tipaj gubernioj signifas paŝon post paŝo turni la pli ol 2,000 guberniojn de nia tuta lando en batalajn fortikaĵojn similajn al Daĝaj, kiuj persistas en la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la socialisma vojo. La normoj difinitaj de la konferenco por Daĝaj-tipa gubernio estas: 1. havi gvidan kernon de gubernia komitato de KPĈ, kiu rezolute plenumas la linion kaj politikojn de la Partio kaj batalas en solidareco; 2. havi klasan superecon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj povi rezolute batali kontraŭ kapitalismaj aktivadoj kaj efike supervidi kaj reformi la klasajn malamikojn; 3. la kadroj de la gubernio, komunumoj kaj brigadoj povas persisti en partopreno en kolektiva produkta laboro kiel tiuj de Hijang-gubernio; 4. rapide atingi grandan sukceson en fundamenta agrara konstruado, meĥanizo de agrikulturo kaj scienca terkulturado; 5. senĉese fortigi la kolektivan ekonomion kaj altigi la produktadon kaj enspezon de la malriĉaj komunumoj kaj brigadoj ĝis aŭ super la nivelo de la lokaj mezklasaj komunumoj kaj brigadoj; 6. plenamplekse disvolvi agrikulturon, forstokulturon, brutobredadon, flankajn okupojn kaj fiŝadon, atingi grandkvantan pliprodukton, multe kontribui al la ŝtato kaj paŝon post paŝo plibonigi la vivon de la komunumanoj.

La grandioza celaĵo elmetita de la konferenco prezentis brilan perspektivon de la disvolviĝo de la ĉina agrikulturo. Estas antaŭvideble, ke en la sekvantaj kvin jaroj triono de la gubernioj de Ĉinio transformiĝos en Daĝaj-tipajn guberniojn kaj aperos pli multaj Daĝaj-tipaj komunumoj kaj brigadoj en la aliaj gubernioj dank' al strebado por efektivigo de la celaĵo. 70 pocentoj de la ĉefaj agrikulturaj laboroj estos farataj per maŝinoj, kaj tio signifas pli ol centpocentan pliigon de la laborfortoj en la kam-

*La Giangdu-a pivota akvoutiliga konstruaĵo kompletigita en la Granda Proleta Kultura Revolucio*



paro de la tuta lando. Tio ebligos grandskalan kreskon de la grenprodukto kaj ankaŭ multan disvolviĝon de la ceteraj produktaj branĉoj en la kamparo. Ni prenu Ŝanhi-provincon, al kiu apartenas Hijang-gubernio, kiel ekzemplon. Se ĉiuj ĝiaj gubernioj fariĝos Daĝaj-tipaj, tiam la produktokvanto de greno kaj la kvanto de komerca greno liverata de ĝi kreskos respektive je 2.5-oblo kaj 4-oblo, kompare kun tiuj de 1974. La naturaj kondiĉoj de la ceteraj partoj de Ŝanhi ne estas malpli bonaj ol tiuj de Hijang, kaj ili povos atingi la nivelon jam atingitan de Hijang. La movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo kaj ĝeneraligo de Daĝaj-tipaj gubernioj havas grandan aktualan signifon kaj profundan historian signifon por plifortigi la bazon de la nacia ekonomio, akceli la modernigon de la industrio, sciencaj teknikoj kaj nacia defendo, por kontraŭbatali kaj preventi reviziismon kaj plifirmigi kaj disvolvi la diktaturon de la proletaro kaj la socialisman sistemon. Tiu ĉi movado, same kiel la agrara reformo, agrikultura kooperativigo kaj popolkomunumigo en la pasinteco, estas alia granda revolucia movado en la ĉina kamparo.

La konferenco alvokis al la tuta lando: "Mobiliziĝu la tuta partio, energie faru agrikulturon kaj batalu por ĝeneraligi Daĝaj-tipajn guberniojn!" La vastaj amasoj de kadroj kaj komunumanoj tuj varme respondis al tio. En la lastaj vintro kaj printempo pli ol miliono da kadroj en la tuta lando iris sur la plejfronton de agrikulturo por teni la revolucion kaj akceli la produktadon kune kun la komunumanoj kaj pli ol cent milionoj da popolanoj sin ĵetis en agraran akvoutiligan konstruadon. Nun la vastaj amasoj de kadroj kaj komunumanoj en la kamparo de Ĉinio estas kritikantaj la reviziisman linion de Deng Hiaŭping "preni la tri instrukciojn kiel ĉefĉeneron", rebatas la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn kaj batalas kun plena memfido por ĝeneraligi Daĝaj-tipajn guberniojn.


BAJ ŜAN:

# Abunda rikolto de malgrandaj dancoj


EN printempo de la kuranta jaro, Ĉinio okazigis en Pekino festivalon de malgrandaj dancoj ludataj de unu, du aŭ tri personoj. La festivalo estis revuado de malgrandaj dancoj en la bona situacio de pliprofunda disvolviĝo de la literatura kaj arta revolucio kun la revoluciaj modelaj teatraĵoj kiel ĝia marko.

La luditaj dancoj sin karakterizis per temoj riĉaj, formoj diversaj kaj stilo de forteco kaj freŝeco. Ili manifestis la prosperecon de la socialismaj revolucio kaj konstruado per brilaj figuroj de proletaraj herooj kaj belaj scenoj. Ĉio ĉi tio klare kontrastis kun la malnovaj dancoj, kiuj multe priskribis mirinfanojn, feinojn, dandojn kaj belulinojn sub regado de la reviziisma literatura kaj arta linio de Liu Ŝaŭki antaŭ la granda kultura revolucio.

Inter la pli ol 260 programeroj troviĝis dancoj ne nur spegulantaj la batalojn de ĉiuj periodoj en la historio de la ĉina revolucio, sed ankaŭ klasbatalon en la socialisma periodo. La tripersona danco "Fervojaj Sentineloj" montris la altan revolucian konsciencon kaj klasan singardemon de fervojistoj, kiuj kaptis dum sia patrolado detruantan klasan malamikon, ĝustatempe forigis danĝeron kaj garantiis sekuran trairon de




*Fervojaj Sentineloj*



*Lukto*

la trajno. La danco "Oraj Semoj" priskribis du malgrandajn ruĝgvardianojn, kiuj sagace kaptis subfosantan malamikon kaj protektis bonajn rizsemojn de popolkomunumo. La afero montris la varman amon de la ĉinaj geknaboj al popola komunumo kaj socialismo.

Ankoraŭ estas multaj dancoj, kiuj varme prikantas la venkon de la granda kultura revolucio kaj la sanan kreskadon de la socialismaj novaj aferoj. La dupersona danco "Surdamuta Knabino Ekvizitas Lernejon" temas pri surdamuta knabino Amej kiu povas paroli post kuracado kaj iri al lernejo akompanate de la avo. La danco prezentas, per gajaj movoj kaj kantado, la atingojn en sanprotekto kaj kuracado akiritajn de medicinaj laborantoj, kiuj venis al kamparo



*Antaŭ Provfunkciigo*

post la komenco de la kultura revolucio responde la alvokon de Prezidanto Maŭ. La danco prikantas la grandan venkon de la revolucia higiena linio de Prezidanto Maŭ. La solodanco "Dank' al Prezidanto Maŭ Mi Surpodiiĝis" estas adaptaĵo de la samtitola poemo, kiun verkis kamparanino-kantistino post kiam ŝi eklaboris laŭ invito kiel instruisto de universitato. Ĝi temas pri infanfianĉino en la malnova socio kiu vizitis universitaton post la Liberiĝo sed estis elpelita el la universitato pro persekutado de la reviziisma eduka linio; en la granda kultura revolucio ŝi suriris, sub la gvido de la revolucia eduka linio de Prezidanto Maŭ, la po-

*Surdamuta Knabino Ekvizitas Lernejon.*







*Oraj Semoj*

*Porkobreda Knabino*






*Maljuna Ministo sur Podio*



*Maljunaj Geedzoj Alportas Manĝaĵojn*

dion de socialisma universitato kiel instruisto. La danco prenis tiun tipan okazaĵon por speguli la grandan veron, ke linio decidas ĉion.

Klopode modli figurojn de proletaraj herooj estas la fundamenta tasko de la socialismaj literaturo kaj arto. Multaj programeroj prezentitaj en la festivalo atingis rimarkindajn sukcesojn en lerno kaj apliko de sperto de la revoluciaj modelaj teatraĵoj en elstarigo de ĉefaj herooj. La solodanco "Maljuna Ministo sur Podio" pri lekciado de laboristoj sur la podio de universitato spegulas profundan ŝanĝiĝon en universitatoj kaŭzitan de la eduka revolucio. La dupersona danco "Maljunaj Geedzoj Alportas Manĝaĵojn" temas pri maljunaj geedzoj kiuj alportas manĝaĵojn al la komunumanoj partoprenantaj en konstruado de irigacia sistemo, kaj modlis figurojn de maljunaj malriĉkamparanoj, kiuj tutanime sin dediĉas por konstrui Daĝajtipan gubernion. La dupersona danco "lukto" priskribas batalan vivon de sagacaj kaj kuraĝaj rekrutoj, kiuj diligente sin ekzercas en milita tekniko por ekstermi malamikojn en la estonteco. La solodanco "Mi Amas Tiun ĉi Profesion" prikantas noblan kvaliton de junaj servistoj kiuj laboras sur malsamaj postenoj, tamen ili ĉiuj brilas per komunismaj pensoj kaj havas fortan infektivon.

La programeroj prezentitaj en la festivalo estas ĝojigaj fruktoj akiritaj de la dancaj laborantoj kiuj lernas kaj praktikas la principojn starigitajn de Prezidanto Maŭ **"kune floru cent floroj, forigu la malnovajn kaj elŝovu la novajn", "utiligu la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligu la fremdajn en servo al Ĉinio".** La danco "Fervojaj Sentineloj" aplikis ĉinajn antikvajn dancmovojn kaj paŝmanierojn de popoldanco, tiel ke ĝi havas intensan lokan koloron. La aŭtoro de la danco iris inter fervojistojn por sperti la vivon kaj rafinis dancmovojn el ilia laborado kaj tiel intensigis ĝian vivetoson. Por esprimi revolucian fierecon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pro suriro de la podio de universitato, la danco "Dank' al Prezidanto Maŭ Mi Surpodiiĝis" alprenis relative larĝajn serenajn movojn el la fremda artfomo baleto. En la ji-nacia dupersona danco "Feliĉa Lumo" spegulanta huraadon de la ji-a popolo pro la finkonstruiĝo de hidroelektrejo en montregiono, estis aplikataj rapidaj movoj de brakoj kaj piedoj en ji-a danco kaj kombinitaj movoj de nacia, popola dancoj kaj baleto, tiel ke bone montriĝas la ĝojo kaj feliĉa sento de la ji-a popolo pro elektra lumigo en ji-a montvilaĝo. Tiu danco kun simpla strukturo kaj renovigitaj movoj donas bonan artan efikon.



*Transportado de Greno sur Akvo*




# Freskoj de Han- kaj Tang-dinastioj trovitaj en la kultura revolucio

Pavilonoj (de Tang-dinastio)



Gjujongguan-pasejo (de Han-dinastio)



Danco kun muziko (de Han-dinastio)





Ĉasado (de Tang-dinastio)



Servistinoj en palaco (de Tang-dinastio)



Poloo (de Tang-dinastio)

HAN GIAN:

# Aerolita pluvo malofta en la mondo



*Sciencaj laborantoj mezuras la kavegon.*

LA 8-an de marto de la kuranta jaro, en Gilin-provinco de nordorienta Ĉinio falis aerolita pluvo malofta en la monda historio.

Posttagmeze de tiu tago, falstelo flugis en la direkto de la rivoluo de la tero ĉirkaŭ la suno en la teran atmosferon kun rapideco de pli ol dek km. en ĉiu sekundo. Kiam ĝi venis super Gilin-provinco, ĝi ekbrulis kaj fariĝis granda fajrobulo pro sia forta frotado kun la atmosfero kaj eksplodis super Ginĝu-komunumo apud la provinca urbo Gilin, je 1 minuto kaj 59 sekundoj post la 15-a horo de tiu tago. Post la eksplodo ĝiaj fragmentoj disfalis en radia formo sur la teron. Je 2 minutoj kaj 36 sekundoj post la 15-a, la lasta aerolito falis teren, traboris frostan tertavolon dikan je 1.7 m. kaj enteriĝis je 6.5 m. Ĝi formis en la tera surfaco grandan kavon kun profundeco de 3 m. kaj diametro de pli ol 2 m., kaj disĵetis terbulojn foren je 100 metroj. Laŭ analizado de la jam kolektitaj aerolitoj la aerolita pluvo ampleksas areon de pli ol 500 kvadrataj kilometroj inkluzive de 7 komunumoj kun pli ol 100,000 loĝantoj, sed ĝi kaŭzis neniajn vundon, morton kaj perdon.

Post la aerolita pluvo, lokaj amasoj tuj raportis tion al koncernaj institucioj. La unuiĝa esplora grupo tuj organizita de la Ĉina Akademio de Sciencoj rapidis al la loko kaj faris serion da sciencaj esploraj laboroj helpate de sciencaj institucioj de la provinco kaj urbo. Ĝis la dua tagdeko de aprilo, oni jam kolektis pli ol 100 aerolitojn. Inter ili la plej malgranda pezas malpli ol 0.5 kg. kaj la pezo de ĉiu el la tri grandaj pecoj superis 100 kg. La plej granda el ili pezas 1,770 kg. Tiu pezo multe superis tiun de la aerolito konservata de Usono, kiu pezas 1,078 kg. kaj estis rigardata kiel la plej granda aerolito en la mondo. Tiaj grandaj nom-

bro, pezo kaj kovrita areo de la aerolita pluvo estas maloftaj en la mondo. Tio estas tre valora por esplorado de astronomio, astrofizio, altenergia fiziko, kosmokemio, kosmogonio kaj terorigino.

Laŭ unuapaŝaj analizo kaj ekspertizo de la unuiĝa esplora grupo de la Ĉina Akademio de Sciencoj, la falintaj aerolitoj havas diversajn formojn kiajn paralelepipedon, sesedron, konuson ktp. Ĉiu aerolito surportas nigran aŭ nigrebrunan fanditan kruston kaj kavojn kun diversa grandeco. La aerolitoj konsistas ĉefe el aŭgito kaj oliveno, malmulte el kamecito, taenito, magnetito kaj aliaj metalaj ercoj kun tipa globgrajna strukturo, tial ili estas nomataj "olivena-bronzita kondrito". La analizo montris, ke la kemiaj elementoj en tiuj aerolitoj estas silicio, magnezio, fero, sulfuro, kalcio, nikelo kaj aluminio.

Dum la apero, eksplodo kaj falado de la aerolitoj, kadroj kaj amasoj de Gilin harditaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio estis aplombaj kaj serioze faris observadon, notadon, kolektadon kaj konservadon, kaj liveris tre valorajn sciencajn donitajojn.

Post la Liberiĝo, Ĉinio trovis kaj kolektis tri aerolitajn pluvojn. Unuafoje en 1958 oni trovis en Nandan-gubernio de Guanghi fero-aerolitan pluvon falintan en Ming-dinastio (1368-1644 p. K.). Duafoje en 1971 falis ŝtono-aerolita pluvo en Ŝuangjang-gubernio de Gilin-provinco.

*Studado kaj klasifikado de la kolektitaj aerolitoj*






JU FANG:

# Toraka operacio en akupunktura anestezo

En la hospitalo Jendouba en la nordokcidenta parto de Tunizio, tuniziaj kaj ĉinaj medicinaj laborantoj en strikta kunlaboro sukcese faris torakan operacion de amputo de pulma hidatida kisto en akupunktura anestezo kaj estis multe laŭdataj de la tunizia popolo.

Iutage, ĉirkaŭ-50-jara viro kun doloraj trajtoj sur la pala vizaĝo, anhelante iris malrapide al la kliniko, premante per ambaŭ manoj la maldekstran parton de sia brusto. La ĉinaj kuracistoj laborantaj en tiu hospitalo tuj faris al li zorgeman ekzamenon kaj prognozis, ke li suferas de hidatidozo en la maldekstra pulmo kaj devas tuj ricevi operacion.

La paciento nomiĝas Hassan. Li estas laboranto de iu manĝaĵa butiko de la urbo Jendouba kaj longe turmentata de la malsano. Post interkonsiliĝo la tuniziaj kaj ĉinaj kuracistoj opiniis, ke medikamenta anestezo ne taŭgas por Hassan dum operaciado pro lia troa malforteco kaj anstataŭ ĝi estos pli bone apliki akupunkturan anestezon, kiu favoros al lia resaniĝo. Ilia ideo estis aprobita de gvidantoj de la hospitalo. Sed antaŭe la hospitalo aplikis akupunkturan anestezon nur en cezara operacio, ligaturo de salpingo kaj amputo de membroj, kaj neniam en toraka operacio, kion ne faris ankaŭ aliaj hospitaloj de Tunizio. Ĉu ĝi certe sukcesos? La kuracistoj de ambaŭ landoj opiniis, ke tunizia anestezisto Nuli multfoje memstare faris akupunkturan anestezon kun bona efiko en la pasintaj operacioj de ligaturo de salpingo k.a., tio estas favora kondiĉo. Ĉifoje, se oni faros bonan antaŭpreparon, ankaŭ la toraka operacio en akupunktura anestezo povos sukcesi. Post tio la kuracistoj de ambaŭ landoj kun plena memfido serioze ellaboris konkretajn procedojn de la operacio kaj bone faris preparojn.

En la tago de la operaciado la suno brilis kaj gaje kantis birdoj sur eŭkaliptoj ekster la operaciejo. Kun certeco pri la sukceso la kuracistoj, anestezisto kaj flegistinoj de ambaŭ landoj iris en la operaciejon. Jen komenciĝis la unua kazo de toraka operacio en akupunktura anestezo en Tunizio. Anestezisto Nuli enigis pinglojn en elektitajn punktojn kaj la kuracistoj tranĉe fendis haŭton, malfermis la torakon, disigis adheran parton de pleŭro. . . Nuli turnadis la pinglojn kaj observis kaj demandis la pacienton pri la efiko, kaj ĉiufoje la lasta respondis: "Tre bone." Flegistino Zaguia de tempo al tempo manĝigis al la operaciato kelkajn pecojn de mandarino. Ĉio iris en ordo. Post du horoj la operacio finiĝis kun sukceso.

Kiam Hassan eliris el la operaciejo en akompano de la kuracistoj, ekster la pordo svarmis homoj. Liaj patrino kaj edzino kun varmaj larmoj en la okuloj kaptis manojn de la kuracistoj kaj senĉese diris dankon. Ankaŭ aliaj ĉeestantoj gratulis la kuracistojn pro ilia sukceso.

La informo pri la sukceso de la operacio en akupunktura anestezo rapide disvastiĝis tra la urbo. Fotistoj alrapidis por kapti kortuŝajn scenojn. Iu tunizia parlamentano, kiu loĝas en la urbo, speciale iris al la hospitalo por esprimi gratulon. Ankaŭ multaj homoj nekonantaj Hassan venis rigardi lin. "Bone kunlaboras Tunizio kaj Ĉinio!" diris emocie Hassan. "Jes, bone kunlaboras Tunizio kaj Ĉinio!" oni ĝoje ripetis.

Dank' al zorgema flegado de la kuracistoj kaj flegistinoj de ambaŭ landoj Hassan rapide resaniĝis, kaj post dekkelkaj tagoj li jam elhospitaliĝis kaj revenis al sia laboro.


*Ĉinaj kaj tuniziaj medicinaj laborantoj kune faras operacion en la hospitalo Jendouba.*



ZONG MIN:




# La uzbekoj



*Uzbeka komunumanino Munavar-ĥan Ibrahim de Ŝaĉe-gubernio de Hingiang*

Uzbek-nacio sume havas pli ol 13,000 membrojn loĝantajn dise en pli ol 85% de la gubernioj kaj urboj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Kaj 65% el la uzbekoj loĝas en Urumĉi, Jining, Taĉeng, Kaŝgar, Jarken kaj Jeĉeng.

La nomo "uzbek" devenis de Uzbek-ĥan, reganto de Ĝinĝangĥan-regno en la 14-a jarcento p.K. Tiam Uzbek-ĥan per milita forto disvastigis islamon kaj akiris la subtenon de la islamanoj, tial iom post iom formiĝis Uzbek-ĥan-regno. En la dinastioj Juan (1271-1368 p.K.) kaj Ming (1368-1644 p.K.), uzbekoj sin okupis ĉefe pri komerco kaj iom post iom fikse loĝis en iuj urboj de Hingiang. Antaŭ la mezo de la 19-a jarcento, plejparto de la uzbekoj entreprenis komercon. Iuj el ili organizis karavanojn kun miloj da kameloj, ĉevaloj kaj azenoj, vojaĝis inter la Meza Azio kaj Hingiang, kaj aliaj faris negocojn pri brutoj, agrikulturaj produktaĵoj, feloj ktp. inter norda kaj suda Hingiang. En la historio, la komercaj aktivadoj de uzbekoj akcelis la ekonomian kaj kulturan interŝanĝon inter Hingiang de Ĉinio kaj la Meza Azio.

Antaŭ la Liberiĝo, la malgrandnombra dise loĝanta uzbeka popolo dronis en senelirejo sub naciaj subpremado kaj diskriminacio faritaj de la reakciaj regantoj. En la lastaj cent jaroj, imperiistoj de la cara Rusio, Britio, Japanio, Germanio, Usono kaj aliaj faris ekonomian agreson al Hingiang kaj turnis ĝin en duonkolonion. Tio multe damaĝis la komercadon de la uzbekoj. Malmultaj grandaj komercistoj sin kroĉis al fremdlandaj kapitaloj kaj fariĝis kompradoroj kaj agentoj de imperiistoj. Ili akiris profitegon per altpreza vendo de varoj kaj malaltpreza aĉeto de agrikulturaj kaj brutaj produktaĵoj en agrikultura kaj paŝta regionoj. Sed, la vastaj amasoj de mezaj kaj malgrandaj komercistoj rapide bankrotis pro konkurenco. Tial uzbekoj rapide dividiĝis en klasojn, kaj aperis metiistoj, kamparanoj kaj paŝtistoj, el kiuj plejparto ne posedis teron, brutojn kaj aliajn produktajn rimedojn. Ili, same kiel malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj de ujgur-, hujkaj kazaĥ-nacioj, suferis kruelan feŭdan ekspluatadon kaj subpremadon de bienuloj kaj brutoposedantoj.

Post la Liberiĝo, en la lumo de la nacia politiko de la Komunista Partio, same kiel la aliaj membroj de la granda nacia familio de la patrolando, uzbekoj sin liberigis el la senrajta stato kaj egale ĝuas demokration kaj liberecon. Komparante la longtempan diskriminacion sub la pasinta reakcia regado kun la nuna feliĉo, la uzbekoj profunde sentis varmecon de la granda familio de la patrolando.

Kun la vigla disvolviĝo de politiko, ekonomio, kulturo kaj eduko de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, la uzbeka popolo montris altan politikan entuziasmon kaj aktivecon en la demokratia reformo, socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj kune kun aliaj nacioj de Hingiang akiris grandajn venkojn unu post alia. Post la demokratia kaj socialisma reformoj, la uzbekaj kamparanoj kaj paŝtistoj, kiuj estis individuaj etproduktantoj, fariĝis membroj de popola komunumo de kolektiva ekonomio. El uzbekoj loĝantaj en urboj, iuj fariĝis industriaj laboristoj kaj aliaj laborantoj de komerca kaj financa rondoj. Multaj brodlertaj virinoj partoprenis en metiista produkta kooperativo. Ilia vivo ĉiam pli boniĝas.

En la longtempa kunvivado formiĝis intima rilato inter la uzbeka kaj ujgura popoloj, kaj pro reciproka influo inter ili ekzistas similaj, eĉ tute samaj karakteroj en vivo kaj kulturo. La lingvo de la uzbekoj tre similas al tiu de la ujguroj, kaj

la antaŭaj uzas la literojn de la lastaj. La religio, moro, kutimo, vesto kaj manĝo de la uzbekoj estas preskaŭ samaj al tiuj de la ujguroj.

La vestaĵoj de uzbekoj karakteriziĝis ĉefe per diversspecaj ĉapoj. La broditaj virinaj botoj kun aparta stilo estas tre belaj. La geometriaj ornamaĵoj broditaj sur kolumoj, brustumoj kaj manikbuŝoj de ĉemizoj prezentas la metiartajn karakterojn de la uzbekoj.

La uzbekoj lertas en kantado kaj dancado. La muzikaj melodioj de tiu nacieco estas ŝanĝemaj, agrablaj kaj belaj, kaj la dancoj estas facilaj, inter kiuj troviĝas la fame konata mantambura danco kun aparta nacia stilo. Post la Liberiĝo, la popolkantoj de uzbekoj plenas de profunda amo al la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ. Ili tiel kantas: "Ĉiuj steloj en la ĉielo vizaĝas al la polusa stelo, kaj la sunfloroj sin turnas ĉiam al la suno. Ĉiuj nacioj batalas en ŝtala unuiĝo sekvante la grandan Kompartion!"

**GU GIN:**

# Freskoj de la dinastioj Han kaj Tang trovitaj en la lastaj jaroj

La antikva freska arto de Ĉinio havas longan historion, riĉan enhavon kaj originalan stilon. En la historio de pikturo ĝi okupas gravan lokon kaj estas kristalo de la saĝa kaj diligenta laborado de la antikva laboranta popolo de Ĉinio.

Sub la direktado de la principo de Prezidanto Maŭ **"servigi la antikvajn al la nuna tempo"**, la arkeologoj de la nova Ĉinio laŭplane faris sciencan malkovron de antikvaj tomboj sub la tero kaj prezentis al la publiko valoregajn antikvajn freskojn en la tomboj. En la lastaj jaroj, en konstruado de irigacia sistemo kaj ŝtupaj kampoj sur montodeklivoj kaj en ebenigado de tero, oni trovis en diversaj lokoj plurajn tombojn de la dinastioj Han (206 a. K. — 220 p.K.), kaj Tang (618 — 907 p.K.) kun valoraj freskoj. Tio estas unu el la gravaj fruktoj de nia arkeologia laboro en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

La tombo de Han-dinastio malkovrita en la gubernio Horinger de la Interna Mongolio estas la plej tipa el la tomboj kun freskoj de tiu dinastio trovitaj en la lastaj jaroj. Ĝi estis trovita de kamparanoj en 1971 en konstruado de ŝtupaj kampoj. La tombo el grize bluaj brikoj longas 19.85 metrojn, havas pordon, ĉambrojn antaŭan, mezan, postan kaj krome 3 flankajn. En ĝi troviĝas sume pli ol 50 grupoj da koloraj freskoj, kiuj plene kovris la murojn de la ĉambroj kaj la koridoretoj, kaj eĉ la volbojn. Oni konjektis, ke la tombo estis konstruita en la periodo de 145 — 200 p.K. La enhavoj de la freskoj kaj skribaj klarigoj pri oficttitoloj sur ili diris, ke la mortinto estas altranga mandareno tien sendita de la kortego de la Orienta Han-dinastio (25 — 220 p.K.), kiu povis decidi aferojn en la nomo de la imperiestro.

La freskoj ĉefe prezentas la promociiĝadon de la mandareno kaj liajn bienon kaj oficejon. La fresko "Procesio" estas la plej grava fresko kiu prezentas la vivon de la mortinto. Tiu fresko havas vastan scenon. En ĝi estas pentritaj diversaj ĉaroj, koloraj ĉevaloj, multaj militaj kaj civilaj subuloj, soldatoj, servistoj k.a., kiuj plene spegulas la luksegan paradon de la feŭda nobela mandareno de Han-dinastio. La fresko havas vivecan esprimivon kaj originalan stilon.

En la fresko "Bieno" estas pentritaj altaj etaĝdomoj, klostroj, putoj, remizoj, draŝejo, kaj staloj de bovoj, ĉevaloj, ŝafoj kaj porkoj, kaj ankaŭ laboraj scenoj pri terplugado, legomkulturado, plukado de morusarbaj folioj k.a. La fresko detale prezentas la luksan kaj diboĉan vivon de la bienulo kaj la laboradon de gesklavoj en la bieno. La fresko "Muziko, Danco kaj aliaj Distroj" montras prezentadon de akrobataĵoj kiel stangosubporto, inversa staro, saltado sur globoj, ponardoĵetado, radoturnado kaj geviran dancon, cetere ankaŭ akompanantajn muzikistojn kaj spektantojn.

La freskoj vidigas ankaŭ la urbojn kaj oficejojn, kie la mortinto iam laboris. En tio ni povas koni

la strukturon de oficejoj de Han-dinastio kaj la loĝejojn de la tiamaj feŭdaj burokratoj.

La freskoj de Han-dinastio estas relative pli fruaj. Krom en la tombo de Horinger, ankaŭ en alilokaj tomboj de Han-dinastio oni trovis relative perfektajn freskojn, kiuj havas realisman stilon en pentrado de homoj kaj bestoj. Plejparto de la personoj en la freskoj estas kun skribaj klarigoj pri ilia ofico. Tiuj freskoj ĉefe registris kelkajn scenojn kaj aferojn, vivece spegulas de pluraj flankoj la socian vivon kaj la ideologion de la frua periodo de la feŭda socio de Ĉinio.

En Tang-dinastio pikturo pluapaŝe disvolviĝis, kaj aperis multaj pentrajoj de alta arta nivelo. Tiam multaj el palacaj kaj ordinaraj temploj kaj ŝtonaj kavernoj estis ornamitaj per freskoj. La enhavo de la freskoj ĉefe temas pri la vivo de tiamaj homoj, pejzaĝoj, floroj, birdoj kaj ornamaj desegnoj.

En la lastaj jaroj ni trovis multajn tombojn de Tang-dinastio. Du tomboj de Tang trovitaj en Ŝenhi-provinco havas delikatajn, perfektajn kaj enhavoriĉajn freskojn.

Unu el ili estas tombo de la kronprinco Li Hian (654 — 684 p.K.) de Tang-dinastio, kaj la alia estas tiu de la kronprinco Li Ĉongjun (682 — 701 p.K.). Ambaŭ tomboj estis trovitaj en Kianhian-gubernio de Ŝenhi-provinco, 1971.

La freskoj sur muroj de koridoro en la tombo de Li Hian estas en simetria pozicio. Ambaŭ orienta kaj okcidenta muroj havas po 4 grupojn da freskoj. Sur la orienta muro estas freskoj "Procesio", "Korteganoj kaj Fremdlandaj Senditoj", "Gvardio" kaj "Nigra Drako", sur la okcidenta — "Poloo", "Korteganoj kaj Fremdlandaj Senditoj", "Gvardio" kaj "Blanka Tigro".

La fresko "Procesio de Ĉasado" kun pli ol 40 pentritaj rajdantoj, longas pli ol 10 metrojn kaj altas ĉ. 2 metrojn. Utiligante la oblikvecon de la galerio de la tombo la pentristoj pentris sur la alta parto de la muro la supran montvojon, sur kiu kuras grupo da ĉasantoj. Tiu fresko registris la diboĉan vivon de nobeloj de Tang-dinastio, kiuj laŭplaĉe disipis la riĉajojn de la socio.

"Poloo" estis pentrita sur la okcidenta muro de la galerio. En la fresko ludas pli ol 20 rajdantoj. Ĝi estas la plej frua registro pri poloo de nia lando.

La freskoj "Korteganoj kaj Fremdlandaj Senditoj" estis pentritaj simetrie sur la orienta kaj okcidenta muroj. Ĉiu el ili havas 6 personojn, laŭ kies trajtoj, vestoj kaj mienoj oni povas konkludi, ke tri el ili estas mandarenoj de Tang-dinastio kaj la ceteraj — fremdlandaj senditoj. Tang-dinastio havis interrilatojn kun najbaraj kaj foraj landoj. La du freskoj spegulas unu flankon de la diplomatiaj aktivadoj de Tang-dinastio, kio ludas gravan rolon en la nuna esplorado pri la amika kontaktiĝo de Tang-dinastio kun aliaj landoj.

La freskoj "Gvardio" kaj "Palacaj Pavilonoj" havas apartan stilon inter la freskoj de Tang-dinastio. "Gvardio" montras gvardion el

*Procesio de Ĉasado (Tang-dinastio)*






multaj personoj, kiuj alte tenas flagojn kaj staras en bonordaj vicoj. En la fresko la flagoj flirtas en vento kaj la gvardianoj silente staras en solena atmosfero, kio montras kontraste la rangojn de nobeloj de Tang-dinastio. "Palacaj Pavilonoj" havas gravan historian valoron. Ĝi registris la aspekton de altaj pavilonoj de la palaco de Tang-dinastio.

Sur la muroj de la antaŭa kaj posta ĉambroj de la tombo de Li Ĉongĵun estas pentritaj figuroj de servistinoj en la palaco de la kronprinco. La unuopaj kaj pluropaj virinoj ĉiuj estas graciaj.

La ĉirkaŭ 100 freskoj en la du tomboj estas tre tipaj, ĉu en ilia enhavo aŭ en la tekniko.

La freskoj en la trovitaj tomboj de Han- kaj Tang-dinastioj estis pentritaj de ordinaraj pèntristoj. En la strukturo, strekoj kaj esprimado de homaj trajtoj de la freskoj en tomboj de Tang-dinastio oni povas vidi originojn de poluritaj verkoj de la tiamaj famaj pentristoj. Tio pruvis, ke la bazaj sennomaj pentristoj estas veraj kreantoj de la arto. En la malhelaj, malvastaj kaj humidaj tomboj la pentristoj devis pentri iam eĉ kun kurbigita korpo kaj senapoga brako. Ĝuste tiuj ordinaraj pentristoj per la kolektiva diligenta laborado restigis al posteuloj valorajn heredaĵojn por esplorado pri la socio, historio, arto kaj arkitekturo de la dinastioj Han kaj Tang.




*Plugado (Tang-dinastio)*

*Procesio (Han-dinastio)*



*Tamburisto (Han-dinastio)*







# La dua granda dolĉakva lago de Ĉinio


## I

En la meza baseno de Jangzi-rivero, ĉe la suda bordo de ĝia fluo en la norda parto de Hunan-provinco troviĝas granda lago kun senlime vasta ondanta surfaco, kiu kuniĝas kun la ĉielo en la foro. Ĝi nomiĝas Dongting-lago, kaj estas fame konata en miloj da jaroj kiel reguliganto de la akvo de Jangzi-rivero.

Dongting estas la dua granda dolĉakva lago de nia lando. Kiom vasta ĝi estas? En antikveco oni parolis malprecize pri ĝia areo per la diro "la okcent-li-a Dongting-lago". Post la Liberiĝo, koncerna fako de la popola registaro faris mezuradon kaj difinis la amplekson de

*Dongting-lago*





*La turo Juejangloŭ*

la lago kun totala areo de 16,600 kvadrataj kilometroj, el kiuj 4,620 kvadrataj kilometroj estas akvo kaj la ceteraj estas montoj, agroj, lagetoj ktp.

Ĉe la suda kaj okcidenta flankoj de la lago enfluas en ĝin 4 riveroj Hiang, Zi, Juan kaj Li; ĉe la norda flanko troviĝas kvar enfluejoj Songzi, Tajping, Oŭĉi kaj Tiaŭhjuan, tra kiuj parto de la akvo de Jangzi-rivero povas flui en la lagon en pluvsezono kaj dank' al tio la ŝveliĝo de la rivero en la malsupra baseno povas esti mildigita. De miloj da jaroj Dongting-lago ludas rolon de reguliganto de la akvo de Jangzi-rivero.

En antikveco, la areo de Dongting estis multe pli granda. En la periodo de la 8-a ĝis la 5-a jarcento a. K. multaj grandaj kaj malgrandaj lagoj ambaŭborde de Jangzi-rivero interligiĝis kaj formis Dongting-lagon. Poste, pro sedimentiĝo de leŭso en la rivero, plejparto de la lagoj fariĝis tero, ŝtopiĝis la enfluejoj ĉe la norda bordo kaj en la suda flanko de la rivero postrestas relative granda lago kaj tio estas la nuna Dongting.

## II

En bela printempa tago ni ascendis la turon Juejangloŭ sur la bordo de Dongting-lago kaj ĝuis la pitoreskan pejzaĝon de la vasta lago.

Oni diras, ke la turo estis konstruita en la periodo de la Tri Regnoj (220 — 280 p. K.). Ĝi staras sur la urbomuro en la nordokcidenta angulo de la urbo Juejang ĉe la rando de Dongting-lago. Tiu trietaĝa konstruaĵo kun supren turnitaj tegmentrandoj impresas per majesta beleco. En la pasintaj jarcentoj, ĝi estis plurfoje detruita de militoj, incendio kaj inundo, kaj ankaŭ foje kaj refoje rekonstruita. Laŭ historiaj notoj, dum la periodo de 618 ĝis 1911, ĝi estis rekonstruita kaj riparita pli ol 20 fojojn. La nuna turo estis konstruita en King-dinastio en 1880. Sed je la Liberiĝo, ĝi jam tre kadukiĝis kaj post la Liberiĝo la popola registaro ĝin renovigis per riparado. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, oni ĝin riparis refoje kaj aldonis al ĝi novajn konstruaĵojn tiel ke tie aperis malgranda eleganta parko.

La nomoj de Dongting kaj Juejangloŭ estas unu tuto en la homa koro: parolante pri la fama turo oni nature ekpensas pri Dongting-lago, pri kiu la fama poeto Li Baj de Tang-dinastio verkis la versojn: "Senlimas lunlum' en zefiro, unuiĝas la akv' kaj l' ĉielo." Sed vere belajn kolorojn aldonis al Dongting-lago la prozo "Pri Juejangloŭ" verkita de fama politikisto kaj literaturisto Fan Ĝongjan de Norda Song-dinastio (960 — 1127 p.K.). Teng Ziging, bona amiko de Fan Ĝongjan, generalo kaj arkitekto fame konata en la historio de Ĉinio estis malpromociita kaj translokigita



*Rikoltado de malfrua rizo en ŝtata kultivejo apud Dongting-lago*

al Juejang pro malplaĉo al potenculo en la kortego. Li rekonstruigis la turon kaj skribis al Fan Ĝongjan, ke la lasta verku artikolon por memorigi la rekonstruon de la turo. Fan plenumis la peton de Teng per sia verko "Pri Juejangloŭ". Tiu verko ne nur priskribis la belon de Dongting-lago kun alta artismeco, sed ankaŭ per eleganta stilo esprimis profundan penson kaj estas multe admirata eksterordinara verko en la ĉina literaturo. La turo Juejangloŭ tre famiĝis pro la artikolo "Pri Juejangloŭ" kaj ankaŭ Dongting-lago estas multe admirata.

Sur la plej alta loko de la turo oni povas klare vidi kunfandiĝintajn lagon kaj ĉielon kaj la pitoreskan monton Gjunŝan en la lago. Tiu malgranda insulo kun areo de nur kelkaj kvadrataj kilometroj ne nur naskis multajn antikvajn belajn kortuŝajn anekdotojn sed ankaŭ produktas la faman teon "arĝentaj pingloj".

La regiono de Dongting-lago estas vasta aluvia ebenajo kun fekunda grundo kaj reto de riveroj. Kaj krome ĝi troviĝas en mezvarma zono kun sufiĉa atmosfera precipitajo kaj ĝia plej malalta temperaturo en vintro estas nur tri gradoj sub la nulo, tial ĝi tre konvenas por kreskado de plantoj. Tiu regiono produktas multan rizon, kaj pro tio

*Plukado de tefolioj*



estas honorita per la nomo de "grenejo de Ĉinio". La vasta akvo de la lago estas abunda je fiŝoj. Inter la pli ol 130 specoj de fiŝoj kaptataj en ĝi troviĝas krom karpo, herbokarpo, blanka karpo kaj bramo, ankaŭ la fame konata "arĝenta fiŝo", speciala produktajo de tiu loko.

### III


Kvankam la regiono de Dongting-lago estas riĉa, tamen antaŭ la Liberiĝo, la popolo de tiu loko vivis tre mizere sub la subpremado kaj ekspluatado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Tiam la reakcia klaso zorgis nur pri rabado de tero, terrento kaj impostoj, kaj ofte okazis inundoj pro longtempa senriparado de la digoj. Historiaj notoj montris, ke en 20 jaroj antaŭ la Liberiĝo Dongting-lago inundis 4 fojojn. La inundo en 1935 disfaligis 90% de la digoj, la kamparo fariĝis senlima maro, pli ol 4 milionoj da loĝantoj estis trafitaj de la katastrofo kaj pli ol 35,000 homoj dronis.



*Fiŝbredejo de Gjunŝan-kultivejo en Dongting-lago*

Post la Liberiĝo, komenciĝis nova paĝo en la historio de Dongting-lago. Sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, la ŝtato faris al la lago laŭplanan plenampleksan ordigadon. En 1950, oni komencis konstrui la akvokonservan kaj terkulturan distrikton de Datong-lago en la mezo de Dongting. Ĝi estis la unua granda konstruaĵo de tiu speco post la fondiĝo de la popola respubliko. Tiu konstruaĵo ne nur elakvigis pli ol 20,000 hektarojn da inunditaj kampoj, sed ankaŭ kvinobligis kvanton de akvo akcepteblan de la lago. En 1952, inter Jangzi-rivero kaj Dongting-lago oni konstruis "Inundakvo-dividan Basenon de Ginggiang" kun areo de 1,000 kvadrataj kilometroj kaj kapacito de 9 miliardoj da kub-

*Gjunŝan-teplantejo*






metroj da akvo, dragis la enfluejon de la riveroj Hiang, Zi, Juan kaj Li, dank' al kio mildiĝis la minaco de inundo de Jangzi-rivero al Gianghan-ebenaĵo kaj la ebenaĵo de Dongting-lago. Post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolo en la regiono de la lago kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion antaŭenpuŝitan de Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj Deng Hiaŭping, kaj samtempe disvolvis vastan amasan movadon de lernado de Daĝaj en agrikulturo, klopodis por preventi inundon kaj reordigi la lagon kaj riverojn, faris fundamentan agraran konstruadon kaj akiris grandan sukceson. Ĝis nun oni jam fosis pli ol 28,000 irigaciajn kanaletojn, konstruis 6,100 elektrajn pumpstaciojn kaj pli ol 10,000 grandajn, mezajn kaj malgrandajn kluzojn kaj kulvertojn, konstruis alttensian elektran linion kun longeco de 3,800 kilometroj kaj grandskale plifirmigis la digojn. Tio ne nur sekurigis la vivon kaj havaĵon de la popolo en la regiono de la lago, sed ankaŭ garantiis riĉan rikolton sur 4 kvinonoj de ĝiaj kampoj ĉu en sekeco aŭ en akvoabundeco. En la lastaj dek jaroj, la agrikulturo de la regiono ricevis riĉajn rikoltojn sinsekvajn, la industria produktado prosperadas kaj la kolektiva ekonomio plifortiĝas kun ĉiu tago. Ni prenu Hanŝoŭ-gubernion apud la lago kiel ekzemplon. Nun la totala produktokvanto de greno de tiu gubernio estas kvinoblo de tiu en 1950 kaj duoblo de tiu en 1965. Ekde la jaro 1970, la gubernio konstruis multajn grandajn kaj malgrandajn irigaciajn konstruaĵojn konforme al lokaj kondiĉoj kaj fosis kanalon kun longeco de 75 kilometroj kaj larĝeco de 130 metroj ĉe la fundo; starigis reton de agronomia eksperimentado de la gubernio, komunumoj, brigadoj kaj taĉmentoj, pli ol cent mil homoj partoprenis en la eksperimentado pri alterna kulturado de akvaj kaj sekaj grenplantoj, pri tririkolta kulturado de tritiko kaj rizo en unu jaro, pri hibridigo, prevento kaj ekstermo de plantaj malsanoj kaj fiinsektoj, pri reformo de grundo ktp., entute dekoj da sciencaj temoj, sur pli ol 2,700 hektaroj da kampoj asignitaj por eksperimentado, kaj per tio oni multe rapidigis la disvastigon de novaj specioj, teknikoj kaj sperto. La plugado, irigaciado kaj drenado, protektado de plantoj, rikoltado, transporto kaj prilaborado de agrikulturaj kaj neagrikulturaj produktaĵoj jam estas fundamente meĥanizitaj.

Post la Liberiĝo, la Kompartio kaj la popola registaro tre multe zorgas la produktadon kaj vivon de la fiŝistoj. En la komenca periodo post la Liberiĝo ili mobilizis la fiŝistojn al potenca batalo kontraŭ banditoj kaj lokaj tiranoj kaj poste gvidis ilin en konstruado de loĝpunktoj, por ke ili fikslOĝu surtere, en efektivigo de meĥanizo de fiŝado, en starigo de fiŝbredejoj kaj disvolvado de multflankaj produktaj aktivadoj. Nun sur la vasta Dongting-lago troviĝas krom la grandaj kaj mezaj ŝtataj fiŝbredejoj ankaŭ malgrandaj fiŝbredejoj de plejparto de la komunumoj. Sekve de disvolviĝo de la tekniko de fiŝbredado kaj progreso de la meĥanizo de fiŝado, la produktokvanto de fiŝoj kreskas kun ĉiu jaro. En 1975 Ĉangde kaj aliaj 9 gubernioj ĉirkaŭ la lago kaptis 23,850 tunojn da fiŝoj.

Sur la vasta Dongting-lago kun akvosurfaco trembriletanta en sunlumo intense laboras miloj da fiŝboatoj. La regiono de la lago nun jam fariĝis vere bela loko kun abunda produkto de fiŝoj kaj rizo, ĉu en sekeco aŭ en akvostagno.



*Kulturado de lotusoj en Dongting-lago*

Inter Ni

# Kial Ĉinio impostas siajn socialismajn entreprenojn?

*Post la publikiĝo de la artikolo "Impostoj en Ĉinio" en la unua numero de EPĈ 1975, legantoj skribis al ni, ke la artikolo helpas ilin en kono pri la fundamenta stato de impostokolekto de la nova Ĉinio. Leganto de FR-Germanio esperas, ke ni plie raportos, kial Ĉinio impostas la socialismajn entreprenojn de komuna posedsistemo. Laŭ nia peto la aŭtoro de la nomita artikolo Liu King verkis tiun ĉi artikolon.*

**La Redakcio**

Ĉinio estas socialisma lando. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la posedsistemo de produktaj rimedoj estis ŝanĝita laŭ la socialisma direkto. La nuna socialisma komuna posedsistemo konsistas fundamente el la tutpopola posedsistemo kaj socialisma kolektiva posedsistemo de laboruloj.

La du posedsistemoj diferencas unu de la alia en komuniga grado. La produktaj rimedoj de la ŝtataj entreprenoj de tutpopola posedsistemo estas posedataj de la laboranta popolo de la tuta lando; ilia produktado kaj la distribuo kaj cirkulado de iliaj produktaĵoj estas farataj sub la unuecaj gvido kaj administrado de ŝtata plano; la amplekso de produkta kosto kaj elspeza normo de la entreprenoj estas unuece difinitaj de la ŝtato; kaj la tuta akumulaĵo kreita de la laboristoj estas donita al kaj unuece disponata de la ŝtato. La produktaj rimedoj de la entreprenoj de kolektiva posedsistemo estas posedataj de la membroj de la kolektivoj; ilia produktado iras sub la direkto de la ŝtata plano; iliaj produktaĵoj eniras en la varcirkuladon ĉefe tra la kanaloj de la ŝtata komerco kaj komercaj kooperativoj; la laboraj fruktoj estas distribuataj inter iliaj membroj laŭ la politiko de la ŝtato.

La ŝtato impostas la entreprenojn de la du nomitaj komunaj posedsistemoj. La industriaj kaj komercaj entreprenoj de la ŝtato devas pagi unuecan imposton difinitan de la imposta leĝo, kaj tiuj de la kolektiva posedsistemo devas pagi unuecan kaj laŭenspezan impostojn difinitajn de la imposta leĝo. La ŝtataj kultivejoj kaj la bazaj kalkulaj unuoj de la kamparaj komunumoj devas pagi agrikulturan imposton difinitan de la nomita leĝo.

Kial nia ŝtato kolektas impostojn de socialismaj entreprenoj de komuna posedsistemo? Ĉar tio utilas al disvolviĝo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La ĉefaj kialoj estas jenaj:

(1) En la nuna etapo la socialisma ekonomia bazo de Ĉinio jam firmiĝis kaj disvolviĝis iom post iom, sed pro la ekzisto de la du nomitaj posedsistemoj, neeviteblaj estas var-produkto, mon-interŝanĝo kaj distribuo laŭ labora kvanto. Kaj pro la ekzisto de klasaj kontraŭdiroj, klasbatalo kaj burĝaj rajtoj ankaŭ ĝermado de kapitalismo estas neevitebla. La socialisma impostokolektado estas unu el la rimedoj por plenumi la plenamplek-san diktaturon de la proletaro super la burĝaro, estas necesa por la ŝtato uzi tiun rimedon por pli bone plenumi la ekonomiajn politikojn, limigi kaj bati burĝajn fortojn, kaj firmigi kaj disvolvi la socialisman ekonomian bazon.

(2) Ĉirkaŭ 90% el la financa enspezo de Ĉinio devenas de la ŝtataj entreprenoj, kiuj donas sian enspezon al la ŝtato en la formoj de imposto kaj profito. La unueca industria kaj komerca imposto de la ŝtataj entreprenoj estas kalkulata laŭ la enspezo de produktaĵovendo kaj tiu de komerca servo, sed ne influata de ŝanĝiĝo de produkta kosto. Se nur al entreprenoj okazis vendado de produktaĵoj, la ŝtato

povas rapide kolekti al si parton de ilia enspezo. Tio ebligas al la ŝtato ĝustatempe ekvilibrigi sian enspezon kaj finance garantii necesajn mon-rimedojn por laŭplane kaj proporcie disvolvi la industrian kaj agrikulturan produktadon. La ŝtato povas preni nur parton de la profito de la industriaj kaj komercaj entreprenoj de kolektiva posedsistemo en la formo de laŭenspeza imposto kaj uzas ĝin al socialisma konstruado, krom kolekti de ili la unuecan imposton.

(3) La nacia ekonomio de Ĉinio estas disvolviĝanta laŭplane kaj proporcie. Sed pro la ekzisto de var-sistemo kaj mon-interŝanĝo, la leĝo de valoro ankoraŭ ludas ian rolon en certa sfero. En tia stato, per la imposta politiko la ŝtato povas stimuli la entreprenojn pli bone efektivigi laŭplanan administradon kaj plenumi la postulon de la ŝtata plano. La malsamaj procentoj de la unueca industria kaj komerca imposto estas difinitaj respektive laŭ la malsamaj produktajoj. Ekzemple, la impostoprocento por produktaj rimedoj estas malalta (5% por maŝinoj), sed tiu por konsumaj varoj ne ĉiutage bezonataj alta (51% por tualeto). Tio reguligas la profitajn nivelojn de malsamaj produktajoj kaj malsamaj produktaj branĉoj, favoras al rapida disvolviĝo de produktado de varoj urĝe bezonataj de la ŝtato kaj povas malebligi al iuj entreprenoj nur ĉasi profiton kaj devii de la socialisma direkto.

(4) La kolekto de impostoj fare de la ŝtato povas stimuli la entreprenojn ke ili pli bone efektivigu sistemon de ekonomia kalkulo. Ĉu la ŝtataj aŭ la kolektivaj entreprenoj de Ĉinio ne prenas profitoĉasadon kiel sian produktan celon. Sed, por plenumi la bezonon de la tuta socio, ili tre atentas ŝparon de homfortoj, materialoj kaj mono kaj klopodas por produkti pli multe da varoj de pli multaj specoj kun pli bona kvalito, kiuj konsumis malpli multan laboron. La impostaj politiko kaj laboro de la ŝtato ankaŭ povas stimuli la entreprenojn al pli bona mastrumado kaj malaltigo de la produkta kosto. Ekzemple, la entreprenoj, kiuj produktas samspecan varon, pagas imposton laŭ la sama imposta procento; tiuj, kies produkta kosto estas alta, havas malmulte da profito post pago de impostoj; kaj tiuj, kies produkta kosto estas malalta, gajnas pli multe da profito. Tial la impostokolekto certagrade kuraĝigas la bone funkciigatajn entreprenojn kaj stimulas la malbone mastrumatajn entreprenojn pli bone praktiki la sistemon de ekonomia kalkulo, klopodi por pliproduktado kaj ŝparado kaj malaltigi la produktan koston.

El la supre menciitaj punktoj vi povas vidi, ke la impostokolektado de Ĉinio esence diferencas de tiu de kapitalismaj landoj. La socialisma sistemo de Ĉinio decidis tion, ke la imposto kolektita de ĝi uziĝas por la popolo. La imposto kolektita de la ŝtato estas uzata tute por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Tio estas elstara karakterizaĵo de la socialisma impostokolekto.

## Kurantaj Aferoj

### SOCIALISMA TRANSFORMO AL LA INDIVIDUA METIA PRODUKTADO KAJ PRIVATA KOMERCO EN TIBETO

Konsiderinte siajn realajn kondiĉojn de la socialisma revolucio, la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio efektivigis socialisman transformon al la individua metia produktado kaj privata komerco en urboj kaj urbetoj. En la komenco de majo, 1976, la tuta privata komerco de la regiono jam iris en la orbiton de la ŝtata komerco, kaj pli ol 90% de la metiejoj transformiĝis en produktajn kooperativojn. Tio estas brila venko de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj de la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, kaj alia granda socia ŝanĝo post la kampara popolkomunumigo en Tibeto. Ĝi spegulas la fortan volon de la vastaj popolamasoj firme iri la socialisman vojon sub la gvido de la Kompartio kaj havas grandan signifon por firmigi la diktaturon de la proletaro en Tibeto, pli fortikigi la sudokcidentan landliman defendon de la patrolando kaj rapidigi la paŝojn de la socialismaj revolucio kaj konstruado de la aŭtonoma regiono.

La ŝanĝo de produkta rilato liberigis produktan forton. Nun, rapide disvolviĝas la produktado de tradiciaj metiaj produktajoj, kiuj estas urĝe bezonataj por disvolvi agrikulturon kaj brutobredadon kaj por la popola vivo. La postiĝintaj manlaboraj metodoj aplikitaj de multaj metiejoj kaj komunumoj estas anstataŭigitaj tute aŭ parte per maŝinoj. La specoj de metiaj produktajoj kaj la totala metia produktovaloro de la tuta regiono en la jaro 1975 kreskis respektive je 2.5-oblo kaj 2.28-oblo kompare kun

tiuj en la jaro 1965 antaŭ la kooperativigo.

## GRANDA MODERNA KOAKSOFORNO STARIGITA EN BENHI

Granda moderna koaksoforno estas konstruita de la Benhi-a Fera-Ŝtala Kompanio. Ĝi estas unu el la gravaj objektoj de teknika reformo de la kompanio. Benhi posedas avantaĝajn kondiĉojn por produkti feron kaj ŝtalon, ĉar ĝi havas riĉajn fontojn de erco kaj karbo en sia ĉirkaŭaĵo. La ekfunkciado de tiu forno havas gravan signifon por rapidigi la paŝojn de teknika reformo de la kompanio kaj disvolvi la feran kaj ŝtalan produktadon multe, rapide, bone kaj ekonomie.

## RAPIDA DISVOLVIĜO DE PEKINA INDUSTRIO

En la lastaj dek jaroj depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la industria produktado de Pekino akiris senprecedencan disvolviĝon. La totala industria produktovaloro de la tuta urbo en 1975 plimultiĝis je 3.5-oblo kompare kun tiu en 1965; ĝi daŭre kreskis en la unuaj kvar monatoj ĉijare kaj atingis la plej altan nivelon kompare kun tiu de la sama periodo en la historio. En la lastaj dek jaroj ŝtalo plimultiĝis je 4.7-oblo kaj fer-erco je 6.6-oblo. La totala kvanto de ŝtalo nun produktita en 17 monatoj jam superis tiun en 17 jaroj antaŭ la granda kultura revolucio. Nun Pekino jam povas produkti nov-tipajn metalaĵojn bezonatajn por aviado kaj artefaritaj tersatelitoj, kiujn pasinte ĝi ne povis produkti, kaj la specoj kaj normoj de fero kaj ŝtalo produktitaj de ĝi plimultiĝis ĝis pli ol dekmil. La produktokvanto de kemisterko, insekticido, dizeloj kaj maŝinoj por agrikulturo kreskis respektive je 4- ĝis 10-oblo. La profito liverita de la pekina industria fronto al la ŝtato dum la lastaj 10 jaroj per 2.4-oblo superis tiun de la pasintaj 17 jaroj antaŭ la kultura revolucio.

## KULTURI VINTRAN SUKERBETON EN SUDA ĈINIO

En la pasinteco oni kulturis sukerbeton nur en la norda parto de Ĉinio. Sed, kun profunda disvolviĝo de la amasa movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, komunumanoj de sudaj provincoj kaj aŭtonoma regiono de nia lando komencis prove kulturi sukerbeton en strikta kunlaboro kun teknikistoj. Post kelkjara ripetada praktikado ili jam trovis taŭgajn teknikojn de kulturado de sukerbeto en suda Ĉinio. Nun la vintra sukerbeto estas kulturata ne nur sur malgrandaj eksperimentaj parceloj sed ankaŭ sur grandareaj kampoj.




*Membroj de la sukerbeta grupo de Jongfu-komunumo de Fugian-provinco ekzamenas suker-entenan kvanton de betoj surkampe.*




*Laboristoj kaj oficistoj varme aklamas la sukceson de borado de la profunda puto.*

# La unua 6011-metra profunda puto sukcese borita

*La ŝaktoskafaldo super la 6011-metra puto*






*La putobora taĉmento n-ro 7002 sukcesis bori la unuan profundan puton de Ĉinio. Jen la laboristoj ligas ruĝan floron al la drila stango, kiu tuj sukcese plenumos boradon de 6011-metra puto.*

*Venkinte multajn malfacilojn, la laborantoj de la putobora taĉmento kolektis pli ol 274,000 donitajojn.*



# Pentristeto

de GUO LIANG



# Simfonio "Sagaca Kapto de la Tigra Monto"










Simfonio *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* estas alia nova verko kreita post la simfonio *Ŝagiabang* en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĝi trovis varman laŭdon-ĉe aŭskultantoj pro sia potenca revolucia etoso, forta nacia koloro kaj abunda efekto de simfonio.

La simfonio estas reverkita sur la bazo de la muziko de la samtitola revolucia moderna pekinopero. Ĝi rakontas kiel iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo persekutis kaj ekstermis, en la periodo de la Liberiga Milito, reakciajn armitajn banditojn en nordorienta Ĉinio. Per tio ĝi prikantas la grandan strategian penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito kaj prikantas lian revolucian militan linion.


Laŭ la karakterizaĵoj de simfonio, la muzikistoj elektis la ĉefajn erojn de la intrigo de la opero kaj prenis la ĉefajn kantojn kaj melodiojn de la pekinopero kiel fundamenton de la simfonio. En ludado kaj akompanado de okcidentaj muzikiloj oni aldonis ĉinajn muzikilojn kiel tamtamon kaj tamburon, *ĝinghu* (ĉina muzikilo en pekina opero kun du kordoj), bivon kaj fluton. Kaj ankaŭ la formoj de ĥoro, dueto, trieto, solo kaj ĥoro sen muzika akompano estas aplikitaj en ĝi. Per ĉio ĉi tio la tuta simfonio ne nur plene utiligas la esprimivon de okcidenta simfonio sed ankaŭ elstarigas la karakterizaĵojn de la ĉina muziko en prezentado de buntaj muzikaj figuroj. Tio estas frukto akirita de la ĉinaj muzikistoj sub la intima zorgo de la Partio kaj en plenumado de la principoj **"utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio kaj forigi la oldajn por elŝovi la novajn"**.




# Aerolita pluvo



Sciencaj laborantoj demandas vidantojn de la aerolita pluvo.





Parto de la aerolitoj kolektitaj post la aerolita pluvo en la regiono de Gilin


La plej granda aerolito





Sciencistoj ekzamenas la lokon kie falis la aerolita pluvo.

# Argilaj skulptaĵoj






Ŝpinistinoj

Glitkurado

Kiuj estas pli fortaj





11879

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

世界语《中国报道》一九七六年第八期（本刊代号：二——九一五